

EL POPOLA ĈINIO

7
1973





Parko en festotago

Pekino Ĝoje Celebris la

Unuan de Majo

LA 1-an de majo, nia ĉefurbo Pekino surmetis al si festajn vestojn. Ĉie en la urbo flirtis ruĝaj flagoj kaj aŭdiĝis la kanto *La Internacio*. La tutan Pekinon regis ĝojo kaj revolucia prospero.

La laboristoj kaj aliaj laborantaj popolanoj de la ĉefurbo kun ĝojo de venko okazigis solenajn aktivadojn por celebri la internacian feston de laboruloj, varme aklamante la grandan venkon de la Granda Proletara Kultura Revolucio kaj novajn venkojn akiritajn sur diversaj frontoj de nia lando dank' al disvolvo de la movado de kritiko al reviziismo kaj reĝustigo de stilo kaj novajn venkojn de la batalo de la monda popolo kontraŭ la imperiismo, koloniismo kaj nov-koloniismo.

De la mateno ĝis la vespero vastaj amasoj de laboristoj, kamparanoj, komandantoj kaj batalantoj de ĈPLA, revoluciaj kadroj kaj intelektuloj, urbanoj, gejunuloj kaj geknaboj svarme torentis al la bele ornamitaj lokoj por partopreni en la celebraj aktivadoj. Centoj da amatoraj kaj profesiaj artaj grupoj prezentis fragmentojn de revoluciaj modelaj teatraĵoj, kantojn, dancojn, *ĉjuji*-ojn, akrobataĵojn kaj aliajn programerojn sur dekoj da scenejoj respektive en la Kultura Palaco de Laboruloj, Ĝongŝan-parko, la Somera Palaco, la parkoj Ĉiela Altaro, Taŭĵanting kaj Ziĝujan. En la

ĉefurbaj stadionoj kaj sportaj haloj sportistoj prezentis al la spektantaro gimnastikajn ludojn, naĝadon, pilkajn maĉojn kaj aliajn sportojn. Vespere riĉaj artaj programeroj estis prezentitaj en ĉiuj teatroj.

La festan celebradon ĉeestis membro de la Konstanta Komitato de la Politika Buroo de la Centra Komitato de KPĈ Ĝou Enlaj, membroj de PB de CK de KPĈ Ĝu De, Giang King, Je Gianjing, Ĝang Ĉunkiaŭ, Jaŭ Venjuan kaj Li Hiannian, alternaj membroj de PB de CK de KPĈ Gi Dengkuj, Li Deŝeng kaj Vang Donghing, membroj de CK de KPĈ Vang Hongven kaj Hua Guofeng, membro de CK de KPĈ kaj la unua sekretario de la Pekina Komitato de KPĈ Vu De, vicprezidantoj de la Komisiono pri Militaj Aferoj de CK de KPĈ Hju Hiangkian kaj Nie Ĵongĝen, vicprezidantoj de la Konstanta Komitato de la Tutlanda Kongreso de Popolaj Reprezentantoj Guo Moĵuo, Sajfuding, Ngapo Ngavang-ĝigme, Ĝou Gianĵen, vicĉefministroj de la Ŝtata Konsilantaro Ĉen Jun, Li Fuĉun kaj Deng Hiaŭping kaj vicprezidantoj de la Tutlanda Komitato de la Politika Interkonsiliĝa Konferenco Fu Zuoĵi kaj Hju Deheng kaj aliaj. Ili celebris la festotagon kune kun la urbanoj kaj amikoj el diversaj landoj de la mondo kaj mangeste salutis ilin por esprimi sian gratulon.



Niaj partiaj kaj ŝtataj gvidantoj Ĝoŭ Enlaj, Giang King, Je Gianjing, Ĝang Ĉunkiaŭ kaj aliaj ĝoje festas la Internacian Feston de Laboro kune kun ĉefurbaj popolanoj.

En la parkoj eksplodis de tempo al tempo varmaj aplaŭdoj de la rigardantoj pro la bonaj prezentadoj. La vastaj amasoj de la ĉefurbaj laboristoj kaj aliaj laborantaj popolanoj plenaj de proletara internaciisma sentimento montris varman bonvenigon al pli ol kvarmil eksterlandaj amikoj venintaj de la kvin kontinentoj de la mondo kaj esprimis al ili siajn korajn dankojn pro iliaj subtenoj al la ĉina popolo. La amika renkontiĝo kaj sono de la kanto *Niaj Amikoj Troviĝas Ĉie tra la Mondo* strikte ligis la ĉinan popolon kaj la revoluciajn popolojn de ĉiuj landoj de la mondo.


En la festotago, sur ĉiuj vizaĝoj brilis festa ĝojo kaj la sonoraj kantoj elkantis la batalan entuziasmon de la ĉina popolo. La laboristoj kaj popolamasoj de nia ĉefurbo decidis pli energie lukti sub la gvido de la granda gvidanto Prezidanto Maŭ kaj la Komunista Partio de Ĉinio por plifirmigi la proletaran diktaturon kaj rapidigi la socialisman konstruadon, observante la strategian orientilon elmetitan de Prezidanto Maŭ “profunde fosi ŝirm-tunelon, ĉie rezervi grenon kaj neniam klopodi por hegemonio” kaj “sin prepari al eventuala milito, sin prepari kontraŭ naturaj katastrofoj kaj servi al la popolo”.



*Studentoj de la Centra Instituto de Nacimalplimultoj de Pekino en
majtaga festkunveno en parko*

Albanaj kunbatalantoj en la Somera Palaco de Pekino





Fremdlandaj specialistoj laborantaj en Pekino kaj fremdlandaj amikoj vizitantaj al Ĉinio en la festotago kune kun la pekina popolo





Ĉefurbaj amasoj celebras la Majan Tagon en Ĝongŝan-parko.

Kampanarinoj de pekina antaŭurbo antaŭ la prezento



Reprezentantoj de la ĉefurbaj laboristoj salutas laboristajn reprezentantojn de Kjuŝu, Japanio, okaze de la Internacia Festo de Laboro.




Samlandanoj venintaj de Hongkong kaj Aŭmen rigardas artan prezentadon en Ĝongŝan-parko kune kun ĉefurbaj popolanoj je la festotago.


Patriotaj Tajvan-aj ĉinoj elmigrintaj al Japanio ricevis en la Somera Palaco de Pekino varman bonvenigon de ĉefurbaj popolanoj je la festotago.



En la Parko Ĉiela Altaro



Artaj laborantoj prezentas al la popolamasoj dancon sur surakva scenejo de la Somera Palaco.



Batala Vojo

— Pri la avangarda rolo de la partiaj organizoj de la gubernio Ĝengding

LASTATEMPE mi veturis suden per vagonaro por viziti la gubernion Ĝengding de Hebej-provinco, kiu situas 270 kilometrojn fore de Pekino. Tiu ĉi gubernio havas gloran historion de revolucia batalo. En decembro de 1924, la Komunista Partio de Ĉinio jam establis tie sian lokan organizon kiu gvidis la popolon de la gubernio por fari batalon kontraŭ imperiismo, feŭdismo kaj kuomintangaj reakciuloj. Post la Liberiĝo la partia organizo de la gubernio daŭre disvolvis la revolucionan tradicion kaj trapasis gloran batalan vojon, gvidante la popolon de la gubernio en peniga luktado kontraŭ malfaciloj por konstrui novan socialimsan kamparon. Dum la vizitado mi vidis kaj aŭdis multajn emociajn okazaĵojn.

BATALO EN MILITAJ JAROJ

En julio de 1937, kiam eksplodis la Kontraŭ-japana Rezistmilito, la partia komitato de la gubernio aktive mobilizis la popolon al gerilo, firme respondante la grandan alvokon de Prezidanto Maŭ “**La popolo de la tuta Ĉinio mobiliziĝu, sin armu kaj partoprenu en la milito kontraŭ agreso**”. Tiam Gaŭping-vilaĝo estis regiono kie aktivis la kontraŭjapana gerila taĉmento de la gubernio. Antaŭ la monumento de revoluciaj martiroj en la vilaĝo, kamarado Sun Venhiang, vicsekretario de la tiama partia filio, rakontis al mi kiel la partia organizo gvidis la vilaĝanojn en batalo kontraŭ la japanaj agresantoj.

Post la komenco de la Kontraŭjapana Rezistmilito, la kapitulacismo de Kuomintango ebligis al la agresantoj rapide surtreti per hufoj la tutan Ĝengding-gubernion. Sub la gvido de la gubernia partia komitato, la partia filio de Gaŭping-vilaĝo aktive organizis la amasojn al la Kontraŭ-

japana Rezistmilito. Jen en la vilaĝo ĉiuj leviĝis sen distingo de aĝo kaj sekso por rezisti kontraŭ agreso kaj subteni la fronton. Foje, pli ol 200 japanaj banditoj kaj pupaj soldatoj surprizis la vilaĝon. Ili bruligis domojn, mortigis vilaĝanojn kaj prirabis riĉaĵojn. 79-jara vilaĝestro Ĝoŭ Luonan kaj aliaj du vilaĝanoj estis pafmortigitaj kaj pli ol 1,400 ĉambroj cindrigitaj. La barbara krimo de la malamikoj vekis nereteneblan indignon de la vilaĝanoj.

Por frakasi invadon de la malamikoj, la vilaĝa partia filio decidis, laŭ instrukcio de la gubernia partia komitato, fondi milican trupon. Membro de la partifilia komitato Liu Ŝazi estis asignita kiel ĝia estro. Kunlaborante kun la Okavoja Armeo la milicanoj ofte iris al lokoj okupitaj de la malamikoj por fortondi elektraĵajn dratojn, dinamiti pontojn, enterigi minojn kaj embuski malamikojn, kaj pro tio estis multfoje laŭdataj de superaj organizoj. K-do Liu Ŝazi estis elektita kiel batala heroo de la tuta gubernio kaj ĉeestis la kunvenon de batalaj herooj de la Limregiono de Ŝanhi, Ĉahar kaj Hebej.

En 1942, la malamikoj ofte faris balaajn atakojn kontraŭ Gaŭping-vilaĝo kaj la batalo fariĝis pli malfacila. Sekretarioj de la partiaj komitatoj de la gubernio kaj distrikto ofte venis al la vilaĝo por kuraĝigi ilin persisti en batalo kaj samtempe disvolvi agrikulturan produktadon. La vilaĝanoj unuigis ĉirkaŭ la Partio kaj elmetis batalan sloganon “Ne lasu colon da tero nekulturita, nek grajnnon da greno forrabita de la malamikoj”. Ilia batalo ĝisfunde frakasis la politikon de la malamikoj “formortigi, forrabi kaj forbruligi”. En vintro de tiu ĉi jaro, laŭ la instrukcio de supera partia komitato “disvolvi tunelan gerilon”, la partia filio gvidis la amasojn en pena laborado de 10

monatoj. Ili fosis en kaj ekster la vilaĝo tunelan reton, per kiu ili surprizadis malamikojn kaj 5-foje frakasis balaajn atakojn de la lastaj. Estis mal-feliĉe, ke kamarado Liu Ŝazi martiriĝis en iu batalo. Antaŭ sia morto li testamentis al siaj kamaradoj: “Neniam permesu al la agresantoj tirani nian landon kaj sekvu Prezidanton Maŭ por fondi novan Ĉinion per batalado.” Lia vorto kuraĝigis la vilaĝanojn al daŭra batalo. Post la venko de la Kontraŭjapana Rezistmilito, la partia filio de la vilaĝo gvidis la milicianojn kaj aliajn vilaĝanojn aktive subteni la Liberigan Militon. La milicianoj de la vilaĝo partoprenis sinsekve en la bataloj por liberigi la urbojn Ĝengding kaj Ŝigiaĝuang kaj ankaŭ en la fama Pekin-Tiangin-kampanjo. En la bataloj ili multon faris, ekzemple, transportis vunditojn kaj municiojn kaj eskortis kaptitojn.

Mi pririgardis parton de riparita tunelo kaj la “Ĉambron pri la Milica Revolucia Batalo”, en kiu estas ekspozitaj fusiloj kaj pistoloj faritaj de partizanoj kaj multaj militpredoj. Tie estas ankaŭ kanto pri la militaj jaroj, kiu diras:

“Minoj estis enterigitaj kaj pafiloj firme tenataj, iuj iris en tunelojn kaj aliaj sur tegmentojn. Ni okupis altajn lokojn kaj obstrukcis la stratojn, kaj la pafoj formis densan reton. Kvankam ni estas kampuloj, tamen malamikoj ne kuraĝas en-trudiĝi en nian vilaĝon.”

GVIDI LA AMASOJN SUR LA SOCIALISMA VOJO

Dum la vizitado gvidantaj kamaradoj de la gubernia partia komitato konigis al mi la periodon de agrikultura kooperigo.

En 1947 okazis la agrara reformo en la gubernio. La kamparanoj, kiuj havis neniam aŭ mal-multe da tero, akiris teron. Altiĝis ilia labora aktiveco kaj disvolviĝis la agrikultura produkto. Sed pro la unuopa agrikulturado, al ili mankis agrikulturiloj, tirbrutoj kaj laborfortoj. Tial la disvolviĝo de produkto estis limigita. Precipe kontraŭ inundo kaj sekegeco iuj kamparanoj havis nenian rimedon krom forvendi sian teron aŭ sin durgigi al aliaj. En 1951, la Centra Komitato de la Partio faris alvokon pri interhelpo kaj kooperado en kamparo. La gubernia partia komitato faris propagandon pri socialisma perspektivo unue inter kompartianoj, membroj de la Junulara Ligo kaj kadroj, energie klarigis al ili la avantaĝojn de interhelpo kaj kooperado kaj alvokis ilin iri unue la vojon de interhelpo kaj kooperado. Kaj sub ĝia helpo la kamparanoj de Fangiaĝuang-vilaĝo k.a. starigis la unuajn elementajn agrikulturajn kooperativojn. Dank’ al la senlaca klopodo de diversnivela partiaj organizoj, la tuta gubernio efektivigis kooperigon en vintro de 1955, kaj popol-komunumigon en aŭgusto de 1958. Kun la disvolviĝo de kolektivigo, rapida progresis la agrikultura produkto. La meznombra pomua produktokvanto de greno altiĝis de 108.5 kg. de 1949 ĝis 205 kg. de 1958. Gvidantaj kamaradoj de la gubernia partia komitato diris al mi, ke Dongĝuang-brigado estis nomita antaŭe “Farmula Vilaĝo”, tamen nun “Feliĉa Vilaĝo”.

En ordinara domo de kamparano, mi renkontiĝis kun kamarado Caŭ Hiu, kooperativestro kaj membro de partifilia komitato en la periodo de kooperigo. Li rakontis al mi la ŝanĝigon de la vilaĝo.




Sekretario de la gubernia partia komitato Sun Gikjuan (la tria de dekstre) kaj vicsekretario Ĝu Peng (la unua de dekstre) kontrolas kreskon de kotonplantoj ĉe Sangiaŭcun-brigado.

Dongĝuang-vilaĝo situas ĉe la suda bordo de la rivero Hutuo. Pro inundo, la vilaĝo estis ĉirkaŭita de sablamasoj en oriento, okcidento kaj nordo. Malriĉaj kamparanoj estis kruele ekspluatataj de bienuloj kaj uzuristoj. 9 dekonoj el la familioj de la vilaĝo estis farmuloj. Pro tio ĝi ricevis la kromnomon "Farmula Vilaĝo". En la malfeliĉaj jaroj, la kanto de vilaĝanoj de Dongĝuang priskribis ilian amaran vivon:

"Printempe sabla vento freneziĝas kaj la plantoj sekiĝas de la blovado. Somere la plantoj velikiĝas kaj oni malamas la Dion senkompatan. Aŭtune ĉiuj rikoltoj doniĝas por la rento kaj imposto kaj vintre la frosta vento dispelas la kamparanojn en vagadon."

En 1948, sub la gvido de la Partio, la kamparanoj faligis la bienulojn, nuligis la ŝuldojn kaj akiris teron. Sub la helpo de laborgrupo de la gubernia partia komitato, en 1954 k-do Caŭ Hiu fondis la unuan agrikulturan kooperativon en la vilaĝo. Tiam mankis al la malriĉaj kamparanoj brutoj kaj agrikulturiloj. La riĉaj kamparanoj asertis, ke la kooperativo "bankrotos antaŭ la vintro". Ankaŭ iu bienulo mokis: "Ĉu malriĉuloj kapablas bone kulturi la teron?" La partia filio gvidis la amasojn en batalo kontraŭ la bienulo kaj decidis "nepre bone kulturi la teron kaj mastrumi la kooperativon"! En la unua jaro la kooperativo akiris rikolton pli bonan ol tiu de unuope laborantaj kamparanoj. La fakto solide refutis la kolumnion de la bienulo. En tiu tempo la kooperativo jam ampleksis 54 familiojn. Alia membro de la partifilia komitato fondis la duan kooperativon. Sed en disvolvado de kooperativo neniam ĉesis la batalo inter la du vojoj. En 1956, pro agitado de iu malbonulo, centfamilia estro en la malnova socio, parto da kooperativanoj intencis eligi el la kooperativo. La partia filio faris al la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj rememorigon pri la tragika vivo en la malnova socio kaj pri la ŝanĝiĝo de produkto kaj vivo antaŭ kaj post la fondiĝo de la kooperativo, pluapasa propagandis al ili la belan perspektivon de nova socialisma kamparo kaj montris, ke la centfamilia estro antaŭe estis lakeo de bienuloj; se oni sekvas lin kaj agrikulturos unuope, ili certe falos refoje en lian ekspluatadon kaj subpremadon. La intrigo por subfosi kooperativon estis frakasita kaj la venko de la batalo plifirmigis la kooperativon.

En 1958, fondiĝis popola komunumo. Sub la gvido de la partia filio la komunumanoj komencis transformi sablejojn en kampojn. Per unu vintro-printempo 120 laboruloj de la vilaĝo konstruis



Veterana gerilano de Gaŭping-vilaĝo faras edukon de revolucia tradicio al milicianoj antaŭ la monumento de la revoluciaj martiroj.

kontraŭventan muron en la sablejo norde de la vilaĝo, kiu fundamente baris sabloventon. Poste, ili disvolvis forstumadon, ebenigis dekojn da dunoj grandaj kaj malgrandaj kaj bonigis la grundon. En la komenca periodo post la Liberiĝo, la meznombra pomua produktokvanto de greno kaj sensemigita kotono estis respektive 100 kg. kaj 15 kg., dum en 1961 491.5 kg. kaj 43 kg. Kiam la popola komunumo de Dongĝuang daŭre marŝis, Liu Ŝaŭki elmetis en 1962 reviziisman linion al la agrikulturo. Li ordonis, ke la komunumoj donu teron, brutojn, fruktajn ĝardenojn kaj porkejojn de la kolektivo al la individuaj familioj. Observante la instruon de Prezidanto Maŭ "Nur socialismo povas savi Ĉinion", la partia filio bremsis la herezan venton kaj persistis en iro de la socialisma vojo. En tiu jaro, la meznombra pomua produktokvanto de greno atingis 513 kg. kaj tiu de sensemigita kotono 55.5 kg. Per tio Dongĝuang-brigado defendis la popolan komunumon. Ekde la proletara kultura revolucio, la partia filio gvidis la amasojn en pluapasa disvolvado de la movado "Lerni de Daĝaj en agrikulturo" kaj levis novan tajdon de fundamenta kampa konstruado. En 1972, la brigado trafis eksterordinaran sekegecon, tamen ĝia meznombra pomua produktokvanto de greno atingis 671 kg. kaj tiu de kotono 78 kg. En la lastaj jaroj, greno kaj kotono liveritaj de la brigado al la ŝtato multiĝis jaron post jaro, la kolektiva ekonomio pli kaj pli firmiĝas kaj la komunumanoj vivas feliĉe.

LERNI DE DAĜAJ

En Ĝengding-gubernio mi vizitis multajn brigadojn kaj ĉie vidis gigantajn fruktojn de lernado de Daĝaj. Sur la antaŭaj dezertaj sablejoj aperis kontraŭventaj forstoj kaj fruktaj ĝardenoj; sur vastaj kampoj antaŭe alkalaj ondiĝas oraj tritikaj plantoj. La kampoj estas ebenaj kaj la kanaloj interkruĉiĝas kiel reto. Kvankam ĉijare printempa sekegeco denove minacis la gubernion, tamen akvo el pumpoputoj malsoifigas la kampojn kaj la plantoj prezentas plaĉan verdon. La komunumanoj diligente laboras por gajni pli abundan rikolton.

Respondeculo de la gubernia partia komitato diris al mi, ke post la lernado de Daĝaj en 1964, la gubernia partia komitato plurfoje sendis kadrojn kaj komunumanojn al Daĝaj por lerni ties bonan sperton. Ili decidis konstrui novan socialisman kamparon per siaj manoj.

40 procentoj de la agroj de tiu ĉi gubernio estis sablaj kaj alkalaj. Por transformi sablan teron kaj forigi alkalon, la gubernia partia komitato fondis esploran grupon. La grupo enketis

pri la formiĝo kaj ekzistanta stato de la sablejoj kaj alkala grundo, resumis amasan sperton en transformado de sabla kaj alkala tero kaj ellaboris la projekton "forigi alkalon meze, reformi sablejojn sude kaj norde kaj ĝardenigi la teron en la tuta gubernio". Laŭ tiu projekto leviĝis en la gubernio grandskala movado de fundamenta kampa konstruado. En printempo de 1966, la gubernia partia komitato mobilizis 40 mil personojn por dragi 27-kilometran riverliton de Ĝoŭhan-rivero, kio multe malpezigis la damaĝon de inundo kaj alkalo.

La proletara kultura revolucio hardis la partiajn organizojn kaj kompartianojn de la gubernio. Ili pli bone plenumis seriojn da principoj kaj politikoj de Prezidanto Maŭ pri popola komunumo. Ili gvidis la amasojn en pli profunda disvolvo de la movado de lerno de Daĝaj kaj akiris grandajn sukcesojn. En alkala regiono mi vidis, ke komunumanoj fosas putojn por irigacii kampojn, forlavis alkalon kaj sterkas kampojn, per tiuj metodoj ili plibonigis kelkdek mil muojn da alkala tero. Ĉengguan-komunumo de la gubernio antaŭe estis "alkalejo kaj fragmitejo plena de bufoj

La gvidantaj membroj de la partia filio de Dongguang-vilaĝo surkampe interkonsiliĝas pri laboro.



kaj kuloj". Antaŭ lernado de Daĝaj, la komunumo ne povis sin provizi per sufiĉa greno. La partia komitato de la komunumo prezentis al la komunumanoj por diskuti la temon: "Se Daĝaj-anoj povas transformi montojn, kial ni ne povas transformi alkalajn grundon?" La diskuto incitis aktivecon de la amasoj. Vang Hejniu, sekretario de la partia filio de Bejmenli-brigado de la komunumo, kaj kompartiano Cuj Ĝengming gvidis la amasojn en fosado de fragmitoj, plenigado de kavoj kaj sulkoj. Ili ĉiam prenis sur sin pezajn kaj malfacilajn laborojn. Ili ŝuoj kaj ŝtrumpoj glaciigis en vintro, sur iliaj manoj aperis vezikoj kaj iliaj brakoj ŝveliĝis pro longtempa svingado de pioĉo, sed ili ankoraŭ persistis en laborado. Post penado de kelkaj jaroj, ili kreis multe da rizkampoj. Ĝis nun la komunumo jam kreis pli ol 1,700 muojn da rizkampoj kaj ĉiujare liveras al la ŝtato 500 tunojn da greno.

En sabla regiono mi vizitis kontraŭventajn forstojn kulturitajn de komunumanoj. Dank' al ilia ŝirmo la vastaj sablejoj estis transformitaj en bonajn kampojn. En la pasintaj dekkelkaj jaroj

la gubernio kulturis forstan zonojn 80 km. longan. Krom tio, oni forstumis 164,000 muojn apud la vilaĝoj, vojoj, kanaloj kaj riveroj. La komunumanoj priskribis la ŝanĝigon de la sablejoj per jena versaĵo:

Por bridi l' sablan drakon, malgraŭ frost' kaj vento

Herooj la miraklon kreis dum dek jaroj.

Jen kalva la sablej' fariĝis arba maro,

Nun vasto bele verdas sub la firmamento.

Dum vizitado mi interbabilis kun multaj personoj, ĉu komunumanoj aŭ kadroj, ĉu maljunuloj aŭ virinoj. Ili ĉiuj laŭdis la bonan laborstilon de la guberniaj gvidantoj en gvido de la lernado de Daĝaj. Plejparto el la guberniaj gvidantoj partoprenis en la revolucia laboro en la Kontraŭjapana Rezistmilito aŭ Liberiga Milito. Ili ankoraŭ konservas la gloran tradicion de intima rilatiĝo kun la amasoj kaj de penema luktado kontraŭ malfaciloj. En la duona tempo de ĉiu jaro ili vivas inter la amasoj. Ĉiu membro de la konstanta komitato de la gubernia partia komitato vivas en unu

Riĉa rikolto de greno en Ĝengding-gubernio





Kampo de Jong-an-komunumo

brigado por tie partopreni en fizika laboro, kaj samtempe fari enketadon kaj helpi tieajn kadrojn en ilia laboro. Trovinte bonan sperton, ili tuj okazigis ĉelokan kunvenon por ĝin disvastigi, kio forte akcelis la lernadon de Daĝaj. En la pasinta aŭtuno, sekretario de la gubernia partia komitato Sun Gikjuan laboris en Ĝuhe-brigado. Li rimarkis tie kutimon, ke oni ne plu faras sarkadon post apero de supra paniklo de maizoj. Sekretario Sun rekomendis al la kadroj de la brigado alilokan sperton. Li diris, ke dum panikliĝo sarko povas konservi humidecon de la grundo kaj koncentri sterkon al la plantoj. Sub lia inspiro la komunumanoj sarkis maizkampojn per 5 tagoj. Post tio la gubernia partia komitato okazigis ĉelokan kunvenon por disvastigi ilian sperton, kio stimulis la produkton de miazo.

En 1972, Ĝengding-gubernio suferis sekegecon neniam viditan en la pasintaj 50 jaroj. En 200 tagoj ne falis pluvo sufiĉe granda. La gubernia partia komitato faris alvokon "disvolvi la spiriton de Daĝaj, peneme lukti kontraŭ la malfaciloj, koncentri ĉiujn fortojn kontraŭ sekegeco por gajni abundan rikolton". La gubernia urbo tuj levis tajdon de subteno al agrikulturo. La laboristoj de guberniaj fabrikoj klopodis produkti multajn dizelojn kaj kemisterkon, kaj ĝustatempe liveris ilin al kamparo. Oficistoj, lernantoj kaj urbanoj iris al la fronto de batalo kontraŭ sekegeco. La gvidantoj de la gubernia partia komitato iris al kampoj kaj tagnokte laboradis kune kun la komunumanoj. La gubernia partia komitato fondis 58 putofosajn

grupojn. Tiuj grupoj fosis pli ol 700 putojn, kiuj multe malakrigis la sekegecon. Iuj komunumoj havas pli multajn kampojn kaj nesufiĉajn putojn, tial la sekegeco estis pli serioza. La partiaj komitatoj de la gubernio kaj komunumoj mobilizis dekmilojn da komunumanoj al transportado de akvo per siteloj kaj kuvoj. Dank' al ilia klopodo ĉiuj plantidoj kreskis fortike. Por gajni abundan rikolton, la gubernia partia komitato alvokis la amasojn planti sur ĉiuj kamprandaj terpecetoj. Tiu aranĝo pliiĝis kulturarenon je 24,000 muoj.

En aŭgusto, verdaj plantaĵoj kreskis prospere. Iunokte, abrupte ventegis kaj hajlis en plejpartaj lokoj de la gubernio. Sub la furioza atako la plantaĵoj sterniĝis sur la tero kaj iliaj folioj estis deŝiritaj. La gvidantoj de la gubernia partia komitato iris al brigadoj, por helpi la tieajn partiajn organizojn bone aranĝi la vivon de komunumanoj kaj samtempe konsiliĝi kun ili pri kontraŭrimedo. Ili kuraĝigis komunumanojn kaj kadrojn per heroaj faroj de Daĝaj-anoj kiuj neniam fleksiĝis antaŭ katastrofoj. Kune kun komunumanoj ili restarigis la plantojn de maizo, sorgo kaj kotono, butis ilin kaj donis grandan atenton al kampa flegado. Dank' al la komuna klopodo de la kadroj kaj amasoj ankaŭ tiujare oni akiris abundan rikolton. La meznombra pomua produktokvanto de greno de la gubernio atingis 462 kg., je 49.5 kg. pli multa ol tiu de 1971. Komunumanoj diris: "En katastrofo ni lernis de Daĝaj kaj sentis ĝian spiriton pli intima. Sen ĝusta gvido de la gubernia partia komitato ni ne povus akiri tiel abundan rikolton!"

Ili Estas Ordinaraĵoj Laboruloj

Baj Ŝumaŭ (*la unua de dekstre*), veterana laboristo kaj kompartiano de la Pekina Ŝtatejo, kun sperto de pli ol 20 jaroj pri afinacio, persistas en produktado, post kiam li fariĝis gvidanto de la laborejo.





Duan Kingbo (*la tria de maldekstre*), inĝeniero de la Pekina Dua Urbo-administra Kompanio kaj kompaniano, interkonsiliĝas kun laboristoj pri konstruado de ponto.

Li Hajfeng, membro de la partia komitato de Daking-olekampo kaj respondeculino de la virina petrol-kolekta taĉmento, ekzamenas la temperaturon de la elputigita nafto. Ĝia taĉmento konservas stabilan kaj altan produktokvanton de sia petrola puto.



ang Haj-an (*dekstre*), sekretario de la partia ĝenerala komitato de la maŝina sekcio de la Dalian-a Ŝtalo, riparas maŝinojn kune kun laboristino.




ang Kujjing (*la unua de dekstre*), infan-laboristino en la nova socio kaj nun sekretario de la partia komitato de la Dongĝan-komunumo, interkonsiliĝas kun la laboristinoj de iu kvartalo-fabriko por pli bone funkciigi la fabrikon.






Vang Ŝuĝen (la kvara de dekstre), laboristino de la Tiangin-a Kvara Kotona Ŝpinteksejo kaj membro de la konstanta komitato de la urba partia komitato, interparolas kun aliaj laboristinoj.



Vang Ĉonglun (la unua de dekstre), vicestro de la sciencetnikna sekcio de la Anŝan-a Fera-ŝtala Kompanio kaj fama tutlanda labormodelo, interkonsiliĝas kun laboristoj pri prilaboro de maŝinparto de erco-dispecigilo.



Fang Ŝuhin, lokomotiva riparisto de la Harbina Fervoja Administrejo kaj kompartiano deveninta de malriĉa kamparano, bone plenumis diversajn taskojn dum la pasintaj pli ol 20 jaroj. Jen li kontrolas lokomotivon.



Hoŭ Devu (*dekstre*), laboristo-
inĝeniero de la Gilin-a Tink-
turo-fabriko, ofte partoprenas
produktan laboron, post kiam
li fariĝis membro de la partia
komitato de Gilin-provinco.
Jen li laboras kune kun juna
laboristino.



Huang Ŝongdi (*meze*), laboris-
todevena vicsekretario de la
partia komitato de la Ŝanhaja
Sepa Ŝpinteksila Fabriko inter-
konsiliĝas kun aliaj pri reno-
vigo de iu nova produktaĵo.

Partifilia Sekretario Vang Giang

ĈINA proverbo diras: “Flugas fronte l’ gvidansero, tuj ĝin sekvas la ceteraj.” Simile al gvidansero, Vang Giang, sekretario de la partia filio de Nongfeng-brigado de Gihian-gubernio de Hejlonggiang-provinco, kompakte unuigas la membrojn de sia filio kaj sensanceliĝe marŝas laŭ la revolucia linio de Prezidanto Maŭ kun komunumanoj sub sia gvido.

IRI LA SOCIALISMAN VOJON

En la jaro 1954, kiam nia kamparo estis en antaŭvespero de la alta tajdo de agrikultura kooperativigo, kompartiano Vang Giang demobiliziĝis el la Ĉina Popola Liberiga Armeo kaj revenis al sia hejmvilaĝo Nongfeng. Je lia foriro la estro de lia trupo diris al li, ke en sia hejmvilaĝo li donu bonan ekzemplon en irado de la kooperativa vojo montrita de Prezidanto Maŭ. Kaj post lia reveno al la hejmvilaĝo, la gvidanta kamarado de la distrikta komitato de la Ĉina Kompartio varme kuraĝigis lin, ke li ludu modelan avangardan rolon de kompartiano en la kooperativa movado.

Tiutempe, en Nongfeng-vilaĝo sin trovis nur unu agrikultura kooperativo, pli ol duono de kies

membroj estis riĉaj mezkamparanoj, kiuj tenis en siaj manoj ĝian gvidon. Ili ne konsentis, ke la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj al kiuj mankis ĉaro kaj ĉevalo aliĝu al la kooperativo, timante ke tio malfavoros al ili. Pro tio pensoj en la kapo de Vang Giang kaj scenoj de la malnova socio aperis unu post alia antaŭ liaj okuloj. Tiam Nongfeng-vilaĝo estis vaste konata malriĉa vilaĝo. Sub la kruela politika subpremo kaj ekonomia ekspluatado de la feŭda bienularo, la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj suferadis de malsato kaj frosto kaj baraktadis kun morto. Lia maljuna patro laboris kiel dungito dum 32 jaroj kaj estis forpelita de la bienulo post vundiĝo de unu el liaj kruroj, kaj baldaŭ mortis kun indigno pro manko de mono por kuraci, postlasante vidvinon kaj orfon. En sia okjara aĝo Vang Giang jam komencis paŝti porkojn por bienulo. . . Ĉu oni povos ankoraŭ toleri tian malluman vivon? Certe ne!

Vang Giang vizitis maljunajn malriĉkamparanojn kaj antaŭe demobilizitajn kunbatalantojn, Li vidis, ke malriĉkamparano Liu Fuŝun estis tiel okupata je vivteno de siaj multaj infanoj ke li eĉ ne povis zorgi sian terkulturadon; malsanema Hju Baŭ-



Vang Giang (la tria de dekstre) en studo-kunsido

gjun devis forvendi la teron kaj ĉevalon ricevitajn dum la agrara reformo... Ilia forta postulo de partopreno al la kooperativo devigis Vang Giang rompi sian silenton. En la kunveno por diskuti pri plivastigo de la kooperativo Vang Giang diris: "Kooperativigo estas socialisma vojo montrita de Prezidanto Maŭ kaj la Kompartio. Estas tre erare, ke vi ne lasas la malriĉkamparanojn kaj malsuprajn mezkamparanojn aliĝi al la kooperativo por ke ili denove suferu de mizero! Ili povas liveri ne multe da kapitalo, tamen ili havas firman decidon revoluciadi sekvante Prezidanton Maŭ. Ili devas ne nur aliĝi al la kooperativo, sed ankaŭ gvidi ĝin."

Tiam ektondris varma manklakado en la kunveno. Oni ja ne atendis, ke la silentema junulo eldiris la koran senton de la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj.

Al lia voĉo eĥe leviĝis multaj aliaj, kaj Nongfeng-vilaĝo boliĝis. Sub la gvido de la Partio, la torentego de kooperativigo ruliĝis antaŭen, kaj la nombro de la membroj-familioj de la agrikultura kooperativo de Nongfeng-vilaĝo kreskis de pli ol 20 ĝis pli ol 70. Supereco de malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj formiĝis en ĝi. En printempo de 1955, Vang Giang estis elektita kiel sekretario de la partia filio. De tiam li marŝas grandpaŝe kune kun la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj sur la socialisma vojo.

Sed la revolucia vojo estas neebena kaj oni povas akiri venkojn senĉese nur per malcedema batalado. Ekde 1960, Nongfeng-brigado trafis naturajn katastrofojn en tri sinsekvaj jaroj. Tiam Liu Ŝaŭki k.s. pledis por sekvi la kapitalisman vojon, nome pliiĝo de parceloj por privata uzo kaj de liberaj merkatoj, pliiĝo de etaj entreprenoj mem respondecaj pri la propraj profitoj aŭ perdoj kaj la fikso de produkta kvoto bazita sur familia mastrumado krom libero de uzuro, libero de dungo de laboristoj, libero de vendo kaj aĉeto de tero kaj libero de privata entreprenado. Sub lia malbona influo, iuj fervore sin okupis pri kulturo de virga tero kaj ne partoprenis en kolektiva produkta laboro. En tiu sortodecida momento de la socialisma kolektiva ekonomio, Vang Giang kunvokis la membrojn de la partifilia komitato por studi koncernajn instruojn de Prezidanto Maŭ, kaj ili vidis klare, ke kulturo de virga tero fare de individuaj kooperativanoj malhelpas la kolektivan produktadon kaj ne estas vojo montrita de Prezidanto Maŭ. Sekve la partia filio faris du rezoluciojn: 1, partianoj estas malpermesataj private kul-

turi virgan teron; 2, la partianoj faru socialisman edukon al difinitaj nepartianoj. Post kuna klopodado de la partianoj, klariĝis la kono de la komunumanoj, pli kaj pli altiĝis ilia unuanimeco kaj entuziasmo en partopreno al kolektiva produktado, tiel ke la kolektiva ekonomio estis plifirmigita.

Sur la vojo de daŭra revolucio, Vang Giang firme memoras la instruon de Prezidanto Maŭ "nepre neforgesu la klasbatalon", kaj ĉiam persistas en konduko de klasbatalo.

Kiam komenciĝis la movado de lernado de Daĝaj, klasa malamiko diris malice: "Daĝaj plenas je suferoj kaj mizero dum ni havas sufiĉe por nin vivteni, do estas senutile lerni de ĝi." Kiam la kooperativo praktikis la Okpунктан Ĉarton de Agrikulturo en scienca terkulturo, klasaj malamikoj denove elsaltis por subfoso. Ili uzis argilon kiel sterkon kaj enmetis dekojn da greneroj en ĉiun semkavon... Vizaĝe al la kalumnioj kaj subfosado, Vang Giang indigniĝis senkompare. Kun la amasoj sub sia gvido, li faris pinto-kontraŭ-pintan batalon kontraŭ la malamikoj kaj antaŭenpuŝis la movadon de lernado de Daĝaj al vigla disvolviĝo.

BONA EKZEMPLO EN PENLABORO

Vang Giang vivis kaj batalis 8 jarojn en armeo. La edukado de la Partio kaj provado de milito faris lin firma revolucia batalanto. En la armeo li estis plurfoje premiita pro merita faro. Reveninte al sia hejmloko post demobiliziĝo, li ankoraŭ tenas sian kvaliton de revolucia batalanto. Vang Giang ofte diras: "Braveco estas necesa en revolucio." Li estas sturmanto en klasa batalo kaj batalo inter la du linioj kaj ankaŭ modelo en produkta laboro.

Jam en 1955, kiam Vang Giang estis ĵus elektita kiel partifilia sekretario, li decidis ĝisfunde ŝanĝi la postiĝintan fizionomion de la hejmloko kaj reformi la naturon.

La kampoj de Nongfeng-vilaĝo plejparte troviĝas sur la bordoj de Anbang-rivero kaj Hianmagoŭ. Ĉiufoje kiam pluvegis, superakvo englutis la grenplantojn sur ili kaj grandskale malaltigis la rikolton. Pro longtempa inundo, la grundo kompaktiĝis kaj la pomua produktokvanto estis tiel malalta, ke ĝi atingis nur ĉ. 50 kilogramojn eĉ en riĉrikolta jaro.

En multaj noktoj Vang Giang vizitis malriĉkamparanojn kaj malsuperajn mezkamparanojn por interkonsiliĝi kun ili pri produkta laboro; en mul-



taj tagoj li esploris la agrojn kaj riverojn de Nong-feng-vilaĝo kune kun kelkaj maljunaj malriĉkampparanoj kaj ellaboris planon por reformi la naturon.

Post ripetada interkonsiliĝo, la partia filio decidis, ke unue oni drenu inundakvon, reformu la grundon kaj aldonu sterkon. Kaj utiligante senokupan tempon de agrikulturo dum ok jaroj, Vang Giang kune kun la amasoj energie faris konstruadon por dreni de superakvo spite al varmego kaj frosto. Ili dragis Hianmagoŭ kaj eliminis la damaĝon de akvo. Tuj poste, ili alportis sablon por plibonigi la argilan grundon de 330 muoj kaj ŝanĝis ilin en fekundajn kampojn povantajn konservi akvon kaj nutraĵojn por plantoj. Krome, ili ankaŭ organizis sterkokolektajn grupojn kaj fekundigis la kampojn per pli multe da sterko. Ili multe bonigis la produktajn kondiĉojn de la brigado kaj la pomua produktokvanto de greno de tiu brigado en 1966 unuafoje atingis 200 kilogramojn. La kolektiva ekonomio ricevis novan disvolviĝon kaj Nongfeng fariĝis ruĝa flago de la tuta gubernio en lernado de Daĝaj en agrikulturo.

La ricevita honoro faris Vang Giang ankoraŭ pli modesta kaj singardema, kaj la venkoj stimulis lin batali plue. En 1968, la partia filio elmetis novan projekton por akvoutiligo, laŭ kiu kluzo devas esti konstruita ĉe la enfluejo de branĉo de Anbang-rivero por irigacii vastan areon de kampoj oriente de la rivero kaj formi pli multe da kampoj de stabile alta produkto. Por tiu konstruo, unue oni

devis haki ŝtonojn. La ŝtonhakejo troviĝis sur la Suda Monto je 7.5 kilometroj for de la vilaĝo. Tiu laboro estis tre peniga kaj malfacila kaj Vang Giang mem iniciative prenis sur sin tiun taskon. Kun 16 homoj sub sia gvido li iris al la monto, pene laboris 45 tagojn, dehakis 750 kubmetrojn da ŝtono por sufiĉe kontentigi la konstruadon de la kluzo. En la sekvinta printempo, la brigado finkonstruis la kluzon en kvar monatoj per penlaborado de nombro da komunumanoj kaj plivas-tigis la areon de irigaciataj kampoj je 100 hektaroj.

Post solvo de la irigacia problemo de la ebenaj kampoj oriente de la rivero, Vang Giang elmetis, en kunveno de la partifilia komitato, la novan problemon, kiel irigacii la kampojn sur altaĵo okcidente de la rivero. Iu proponis dragi, kiel antaŭe, la kanaleton kiu kondukas akvon al la pumpstacio, dum la plejparto de la komitatanoj opiniis, ke tia dragado farata en ĉiu jaro ne povas solvi la problemon ĝisfunde. Vang Giang ne tuj esprimis sian opinion. Li iris kun la komitatanoj kaj kelkaj maljunaj malriĉkampparanoj al Anbang-rivero kaj poste iris laŭ la kanaletoj ĝis la pumpstacio ĉe la piedo de Vangbo-monto. Vang Giang demandis la aliajn: “Kiel oni povas irigacii pli multe da tero per la akvo de la pumpstacio, laŭ via opinio?”

Post la esplorado, ili bone vidis la veran staton kaj diris unuvoĉe: “Trahaku Vangbo-monton kaj ŝanĝu la fluejon de Anbang-rivero, por ke ĝi fluu preter la pumpstacio.”

“Prave, kaj tiam estos pli multe da akvo por irigacii pli multe da tero. Tio estas bona ideo!” Vang Giang tre ĝojiĝis. Li pensis, ke la amaso havas senliman saĝon kaj forton. Li tuj eksentis, ke li plenas je neelĉerpebla forto.

Agado tuj sekvis decidon. Vang Giang mobilizis la komunumanojn por ekbatali kontraŭ Vangbo-monto kaj en 40 tagoj ili konstruis novan fluejon kun longeco de 1.5 kilometroj.

En printempo de 1970, Nongfeng-brigado travivis severan provon. Granda kvanto da akvo de degelinta neĝo sur monto rapide torentis malsupren en Anbang-rivero. Kiam la komunumanoj estis batalantaj kontraŭ trosekeco por semado, la digo de la nova riverfluejo breĉiĝis vespere. Informiĝinte pri tio, Vang Giang tuj mobilizis komunumanojn por savi la kampojn de la danĝero. La breĉo pli kaj pli larĝiĝis. Se oni ne rapide ŝtopus ĝin, la semado estos malbone influita. Tion vidinte, Vang Giang kaj du aliaj membroj de la partifilia komitato saltis en la akvon profundan ĝis la talio. Tio efikis kvazaŭ signo de ordono, kaj la ĉeestantaj pli ol 20 junuloj ankaŭ saltis unuj post aliaj en la akvon. En fruprintempa vespero de norda Ĉinio la akvo estis ĝisoste malvarmega.

Malgraŭ ke iliaj vatitaj vestoj estis tramalsekigitaj, ili persiste portis pajlsakojn plenajn je sablo al la breĉo kaj finfine ŝtopis la breĉon post pena luktado.

Sub la gvido de kamarado Vang Giang, la komunumanoj de Nongfeng-brigado pene luktadis en sinsekvaj jaroj kaj donis novan fizionomion al sia loko. Ili konstruis 1 kluzon, 1 pumpstacion, 1 riverbarajon, 4 putojn kun elektra pumpilo, elektro-transmisian linion kun longeco de 3 kilometroj, 11 trunkajn irigaciajn kanaletojn kaj 105 branĉajn kanaletojn kun totala longeco de 14.5 kilometroj, kiuj formis unuapaŝe reton por drenado kaj irigaciado al 80% de iliaj kampoj. En 1972, la pomua produktokvanto de greno atingis 303 kilogramojn malgraŭ multaj pezaj katastrofoj. Tujare, Nongfeng-brigado vendis al la ŝtato 670 tunojn da greno.

BONA SEKRETARIO

Laborinte pli ol dek jarojn kiel sekretario, kamarado Vang Giang profunde komprenas, ke la ŝlosilo por esti bona estro de la gvidantaro kaj bone ĝin konduki estas la ĝusteco de politika linio kaj agorda kunagado. Tial li metis la linian edukon



Vang Giang (la tria de maldekstre) konsiliĝas pri laboro kun manipulantoj de agrikulturaj maŝinoj.

en la unuan lokon en konstruado de la gvidantaro.

En aŭtuno de 1972, reveninte de vizitado al alia loko, Vang Giang atente aŭskultis raporton de Ĉu Huajju, membro de la partifilia komitato kaj vicestro de la revolucia komitato. Informiĝinte ke ĉiuj laboroj estas bone plenumitaj laŭ la plano, li tre ĝojis. Sed kiam li sciigis, ke malgranda Ĉu asignis ĉaron por transporti vergojn por iu komunumano, li demandis: “Li estas malforta kaj malmulte partoprenis en kolektiva laboro, kiel li povis akiri tiel multe da mono por aĉeti vergojn? Kaj por kio tiom multe?”

“Li prunteprenis la monon de la kredita kooperativo kaj aĉetis vergojn por fari korbojn.”

“Se li povas plekti korbojn por disvendi, kial li ne povas partopreni en kolektiva laboro?”

“Li ne povas fari pezan laboron, kaj cetere la kooperativo ja lin helpadas; se li gajnos monon per plektado de korboj, malpeziĝos lia ŝarĝo al la brigado, ĉu ne?” klarigis malgranda Ĉu.

Vang Giang diris pacience al li: “Al tia komunumano ni devas doni konvenan helpon. Tamen por lin helpi ni ne devas atenci la interesojn de la kolektivo. Se li scipovas fari korbojn, ni povas postenigi lin en la grupo de flankokupa produkto, kaj tiamaniere ni povas samtempe disvolvi la kolektivan ekonomion kaj pliigi lian enspezon, ĉu ne? Ni kadroj ja devas instrui la komunumanojn ke ili amu la patrolandon kaj la kolektivon kaj firme iru la socialisman vojon sen ŝanceliĝo.”

Malgranda Ĉu bone pripensis liajn vortojn kaj estis tre kortuŝita. Ho, kiomfoje Vang Giang pacience helpis lin, de kiam li fariĝis kadro.

Kune kun la aliaj komitatanoj Vang Hiang zorge gvidis la agrikulturan produktadon, sen inklino al formalismo kaj ĉaso de famo, sed kun honesta laborstilo.

En aŭtuno de la pasinta jaro, alilokanoj vizitis ilian brigadon. Vang Giang kaj kelkaj kadroj kondukis ilin al la porkaj kaj ŝafaj staloj kaj kampoj por pririgardo. Vidinte la bildon de riĉa rikolto, la vizitantoj esprimis sian admiron de tempo al tempo. Vang Giang pensis, ke estas ne konvene montri al la vizitantoj kamaradoj nur la sukcesojn. Li do kondukis ilin al inundita maizkampoj. Montrante al ĝi Vang Giang diris: “Lastatempe ni zorgis pri batalo kontraŭ nur trosekco sed ne

inundo, pro unuflankeco en nia penso, sekve aperis tia afero.” La vortoj de Vang Giang multe kortuŝis la vizitantojn kaj ili diris: “Ni lernis de vi ne nur sperton, sed ankaŭ bonan laborstilon!”

Post hardado de la granda kultura revolucio, plifirmiĝis la revolucia volo de Vang Giang kaj ankaŭ lia laborstilo multe ŝanĝiĝis. Antaŭ la kultura revolucio, li laboris kun sufiĉa kuraĝo, tamen mankis al li demokratia spirito, pro kio la gvidantaro ne tiel bone unuiĝis kaj ofte ne povis aŭdi kritikojn de la amasoj. En la kultura revolucio, lia ideologia kompreno altiĝis dank’ al lernado kaj helpo de la amasoj. De tiam li donis bonan ekzemplon en praktiko de demokratia centralizismo, interkonsiliĝas kun la amasoj pri ĉiuj aferoj kaj senĉese antaŭenpuŝis la amasan movadon de lernado de Daĝaj en agrikulturo dank’ al komuna strebado.

En printempo de 1970, kiam oni devis irigacii tritikajn kampojn, la akvoutiliga sekcio de la gubernio instrukiis, ke oni irigaciu la tritikajn kampojn pluginte sulkojn en ili. La vicestro de la revolucia komitato respondecanta pri akvoutiligaj aferoj kaj kelkaj aliaj kamaradoj pledis por irigacio sen sulkoj pro timo ke plugado de sulkoj difektos tritikajn plantojn. Vang Giang malpacienckiĝis kaj volis mem plugi sulkojn, sed li tuj konsciis, ke tia memfaro de ĉio estas malprava. Li pensis, ke ili, senspertaj en tiu afero, volas tion fari ja pro timo ke plantoj difektiĝos, do oni devas pacience atendi la altiĝon de ilia kono en propra praktikado. La irigacio sen sulkigo farita de la vicestro fiaskis kaj faris memkritikon pro tio en la revolucia komitato. Ankaŭ Vang Giang faris memkritikon pro la malsukceso kaj prenis ĝin kiel lecionon por la kolektivo. En la sekvanta fojo, la vicestro konsentis sulkigi la kampojn por irigacio kaj persone plugis sulkojn. Dank’ al zorgo de Vang Giang, vigliĝis la demokratia diskutado en la partia filio, ĉiuj povas diri kion li volas, kaj la solidara partia filio bone ludas sian rolon kiel fortikaĵo en batalo.

La senĉese akiritaj venkoj estas nur novaj startaj punktoj en konstruado de nova socialisma kamparo. Nongfeng-brigado antaŭenmarŝas senhalte kaj ĉijare ellaboris sian trijaran planon. Vang Giang decidis plue pentri superban bildon de riĉa rikolto sur la tero apud Anbang-rivero kune kun la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj, kaj malfermi brilan perspektivon kun agrikulturo, forstokulturo, brutobredado, flankokupoj kaj fiŝado en prospero.



Du Siteloj

da Akvo

de HAŬJAN

EN iu fruprintempa tago antaŭ 18 jaroj mi iris al montvilaĝo ĉe la piedo de Janŝan-montaro por fari raportadon. Mi piediris sola el la gubernia urbo Ŝunĵi, transpasis la pramejon de Ĉaŭbaj-rivero, trairis dek-lian sablejon kaj dek-lian (1 lio = $\frac{1}{2}$ kilometro) vojon sur montetoj kaj atingis ĝin jam en profunda nokto.

En la oficejo de la agrikultura kooperativo mi intervidiĝis kun la partifilia sekretario Hiaŭ. Li prezidis kunvenon de komunumanoj; je la fino de la kunveno oni estis diskutanta pri afero negrava. “Kamaradoj,” laŭte diris Hiaŭ, “silentu, la problemo de portado de akvo al Dua Onklo Han solviĝos jene: ekde morgaŭ nia kooperativo faros tion por li kaj ĉiutage unu el niaj familioj laŭvice portos por li du sitelojn da akvo. Ĉu bone? Ĉu vi havas malsaman opinion?”

“Ne!” ĉiuj respondis unuvoĉe.

Hiaŭ fermis sian notlibron kaj diris: “Nu, ni do fermas la kunvenon.”

Apenaŭ finiĝis la vortoj de la sekretario, aŭdiĝis krio de iu: “Mi havas malsaman opinion!” Kun la voĉo stariĝis en la lamplumo forta viro kun aĝo de pli ol 30 jaroj; liaj aparte brilaj okuloj disradiantaj bonvolemon kaj firmadecidecon impresis, ke li estas homo tre afabla. Li rigardis jen tiun jen alian kaj fine restigis sian rigardon sur la vizaĝon de la partifilia sekretario kaj takte diris: “Por prosperigi nian aferon, nun ĉiuj estas tre okupataj. Dua Onklo Han vivas sola kaj ne bezonas multe da akvo, do ne necesas ĝeni ĉiujn per laŭvica portado de akvo por li. Portante akvon ĉiutage mi devas preterpasi lian domon, do mi povas liveri al li du sitelojn da akvo...”

Post pripenso Hiaŭ diris al ĉiuj: “Diru nun, kiel vi opinias pri la peto de Ma Ĉanghin?”

“Bone,” diris iu, “tio ja estas negrava afero.”

“Do li iom penigu sin,” diris alia.

Kaj tiamaniere la simpla afero estis simple solvita.

Mia tasko estis raporti pri avangarda faro, kompreneble mi ne atentis pri la bagatela afero de du siteloj da akvo kaj forgesis ĝin jam post eliro de la kunvenejo. Sed kiu atendis ke tiu simpla afero kaŭzis tre komplikajn sekvaĵojn!

En iu mateno post kelkaj tagoj, kiam mi estis manĝanta kune kun Hiaŭ, iu junulino rapidis al ni kaj diris: “Tuj iru rigardi, sekretario; Rastilo Han kverelas kun frato Ĉanghin pro la portado de akvo!”

Nenion komprenante pri tio, mi iris kun Hiaŭ sur la straton; fore antaŭ ni aŭdiĝis kverelaj voĉoj kaj baldaŭ ni vidis ke grupo da viroj kaj virinoj svarmas ĉe kaduka pordo; mi alproksimiĝis kaj vidis la staton klare.

Sub la pordo staris viro kun aĝo de ĉ. 40 jaroj. Mi pensis, ke li devas esti Rastilo Han. Li estis oste malgrasa, lia vizaĝo vakse flava kun rondaj okuloj; kun unu piedo premanta la sojlon kaj ambaŭ manoj firme kaptantaj la pordoframon lia pozo montris, ke li ne lasis aliajn eniri la korton.

Kontraŭe al li staris Ma Ĉanghin kun elstariĝita brusto, la kruroj unu antaŭ la alia, unu mano premanta la talion kaj la alia brako kroĉe tenanta la portvekon; la du siteloj el cipresaj tabuloj starantaj surtere kroĉiĝis sur la hokoj pendantaj de

ambaŭ ekstretoj de la portveкто; sur la vizaĝo de Ma brilis kelkaj ŝviteroj.

Hiaŭ sin puŝis en la amason kaj admonis ke ili interŝangu opiniojn senemocie.

“Sekretario,” diris Rastilo Han en hasto, “jen Ma Ĉanghin, kiu havas nenian parencecon kun nia domo, venas porti akvon por mia Dua Onklo malgraŭ mia opono. Ĉu tio ĉi ne estas ago de tirano?”

Mirigite Hiaŭ lin demandis: “Nia agrikultura kooperativo faris aranĝon, ke senlaborpova malriĉkamarano de nia kooperativo havu manĝaĵon, hejtaĵon kaj akvon. Kiel vi tamen diras, ke tio estas ago ofenda?”

Kun malkredemo Rastilo Han diris moke: “Ĉu la agrikultura kooperativo, kiu okupiĝas nur pri kolektiva terkulturado, ankaŭ vivtenas senlaborpovan maljunulon? Mi ne kredas ke en la mondo ekzistas tia bonaĵo. Kaj cetere, ja ĉiu familio el via ne-granda malriĉa kooperativo vivas ne tiel facile, kredeble ili eĉ ne povas plenŝtopi sian stomakon, ĉu ne? . . .”

“Ni volas,” diris Hiaŭ, “kaj ni certe povas fari tian bonaĵon—jen estas la avantaĝo de nia kolektivo iranta la socialisman vojon. Ĉu vi dubas pri tio? Do rigardu kaj juĝu mem!”

“Ne, ne, sekretario,” Rastilo Han diris haste. Li montris per sia mano en la pordon, larĝe tiris sian buŝon kaj diris: “Li estas frato de mia patro kaj nun maljuniĝis kaj malsaniĝis, ĉu mi ne sentas honton antaŭ la parencoj kaj amikoj, se mi lasus alian prizorgi lin?”

Antaŭ kiam Hiaŭ ekdiris ion, Ma Ĉanghin ekŝvingis sian grandan manon kaj diris decideme: “Sekretario, nepre ne konfidu Duan Onklon Han al li!”

Rastilo Han tiel ekscitiĝis, ke li eksaltetis: “Kial ĉi ŝovas cian nazon en fremdan vazon? Kiel ajn



malharmonia estas la rilato inter mi kaj mia onklo, ni tamen apartenas al unu sama domo.”

“Laŭ mia opinio,” diris Ma Ĉanghin, “samdomaneco estas malpli fidinda ol sama malriĉeco. En via insista peto por prizorgi la maljunulon tre verŝajne kuŝas nebona intenco . . .”

Rastilo Han estis kvazaŭ pikita: “Vi, vi kalumnias!”

“La piedsignoj estas faritaj de vi mem,” diris Ma Ĉanghin kun la kutima neurĝemo. “En la dekdua monato de la pasinta jaro, kiam Dua Onklo

Han ankoraŭ mastrumis unuope, li malsaniĝis kaj devis etendi sian manon el la fenestro kaj preni neĝon por estingi sian soifon, tiam vi tamen ne portis akvon por li . . .”

Rastilo Han kriis histerie ne lasante Ma Ĉanghin daŭrigi sian parolon: “Vi mensogas, vi mensogas! Fiintencon ja havas vi Ma Ĉanghin! Vidante ke mia onklo ne havas gefilojn kaj nun jam mortos pro grava malsano, vi deziras heredi liajn kvin muojn da tero per kelktempa servo al li, kaj tiam vi povos preni al vi edzinon dank’ al la heredaĵo . . . Ho, sekretario, donu al mi vian apogon!” Kriaĉante li komencis ploregi.

Ma Ĉanghin tiam ne plu povis sin deteni de ridego: “Ej, finfine vi tamen eldiris sinceran vorton. Antaŭe kiam ni mastrumis unuope, la posedaĵoj de Dua Onklo Han sendube devis esti heredita de vi, tial vi tute ne zorgis pri lia vivo; nun fondiĝis la agrikultura kooperativo, kaj apenaŭ ni etendis al li nian helpan manon, vi jam tiel brule maltrankviliĝis, timante ke vi ne povos ricevi la heredaĵon. Vi zorgas pri nenio krom la posedaĵoj. Konsiderante sole pri tio ĉi, ni jam ne povas permesi al ni konfidi Duan Onklon Han al vi; li estas membro de nia kooperativo kaj ni priservos lin ĉiam kiam li ankoraŭ vivas. Sciu, ke ni estas homoj kiuj ĉiam tenas siajn vortojn!” Tion dirante li metis la vekton sur la ŝultron kaj kuris en la korton portante la sitelojn.

Unu semajnon poste, mi devis forlasi la montvilaĝon. Hiaŭ diris al mi, ke mi forveturu per la ĉaro irona al la gubernia urbo por alporti semon. Veninte al la vilaĝfino mi vidis, ke la veturigisto estas Ma Ĉanghin.

Iu knabo de 5-6-jara aĝo ludis sur la suda deklivo apud Gingi-rivero. Vidante ke mi staras antaŭ la ĉaro, li alkuris kaj grimpis sur la ĉaron de malantaŭe.

Ma Ĉanghin frape eligis la cindron el sia pipo, demetis sian vatitan jakon, volvis la knabon per ĝi, karesis la verton de la knabo kun rideto kaj tiam eltiris la longan vipon kun ruĝa kvasto kaj krie ordonis la ŝarĝbrutojn ekiri.

Longa estis la vojo, kaj havante kunveturanton oni nature provis peli la enuon per interbabilo. Mi do denove ekparolis kun Ma Ĉanghin pri la vektoportado de akvo por Dua Onklo Han.

Ma Ĉanghin ĵetis rigardon al mi kaj diris ridante: “Kamarado, tiutage vi ĉeestis kaj ĉion vidis. Estas vere, ke kia homo tia koro!”

Dum veturigado de la ĉaro, Ma Ĉanghin parolis pri la domo Han. Dua Onklo Han laboris kiel dungito por bienulo dum la tuta vivo, sed li eĉ ne havis la eblecon preni al si edzinon. Dum la agrara reformo, li ricevis 5 muojn da tero. Vidante ke li maljuniĝis kaj estas malsanema, la monavida Rastilo Han deziregis ke li baldaŭ mortu por ke li povu heredi la teron . . .

Svingante la vipon, Ma Ĉanghin diris indigne: “En la lastaj jaroj maljuniĝis Dua Onklo Han, tial Rastilo Han estis tute indiferenta pri lia vivo, sed kiu atendis ke li kovas diablan kalkulon ankore. Li eĉ faris akuzon, kiel ŝtelisto kiu krias ‘kaptu ŝteliston’. Por diri sincere, mi deziras ke Dua Onklo Han vivu pli longe kaj ĝuu la feliĉon de socialismo . . .”

Kiam la veturilo ascendis malgrandan altaĵon, aro da birdoj surpriziĝis kaj ekflugis.

La knabo sidanta sur la ĉaro salte leviĝis laŭte kriante: “Paĉjo, paĉjo, pigoj!”

La voko de la knabo mirigis min. Dum la kverelado, Rastilo Han ja kalumniis, ke Ma Ĉanghin deziras plimultiĝi sian posedaĵon por preni edzinon. Kial li tamen jam havas filon? Estis nedece demandi Ma pri tio kaj min turmentadis la scivolemo.

Timante ke la filo falos, Ma Ĉanghin lin apogis per mano kaj diris: “Ne moviĝu, gardu vin de malvarmumiĝo.” Li denove volvis la knabon per la vatita jako, montris al mi kuntiritajn brovojn, ĝemis mallaŭte kaj diris: “Se ne stariĝus la agrikultura kooperativo, en tio maljuna Hiaŭ ludis la gvidan rolon, Dua Onklo Han estus mortinta jam en la pasinta vintro pro malfaciloj. Mi scias la maldolĉon sen parenculo kaj suferis de unuopa mastrumado. Je la 7-jara aĝo mi fariĝis orfo post kiam miaj gepatroj mortis de malsato; se la malriĉaj onkloj ne helpus min, mi ne povus vivi ĝis hodiaŭ . . .” Li svingis la vipon kaj la brilaj okuloj rigardis antaŭen, li diris mallaŭte kvazaŭ al si mem: “Nur post longa suferado mi ĝisvivis la liberiĝon kaj agraran reformon kaj tiam prenis al mi edzinon. Mi pensis kun ĝojo, ke la tuta restanta parto de mia vivo estos nur feliĉo. Sed kiu vidis, ke la vojo de unuopa mastrumado estas malĝusta! En la kvina tago post la naskiĝo de la knabo, lia patrino rimarkis, ke la ĉielo malsereniĝis dum la tritiko-rikoltado, kaj eliris por helpi min porti tritikon, timante ke mi sola ne povas porti la falĉitan tritikon en la hejmon; kaj ŝi malsaniĝis de malsekiĝo en pluvo . . .”

Liaj okuloj ruĝiĝis kaj li tuj ĉesigis sian parolon. Li levis sian kapon, elstarigis sian bruston kaj forte frapis per la vipo.

La saliko apud la vojo skuiĝis kaj unu ŝoso kun freŝaj ĝermoj falis sur la ĉaron.

La knabo etendis sian maneton, kaptis la ŝoson kaj ĝoje kriis skuante sian kapeton: “Verdiĝis! Venas printempo!”

.....

Printempoj, printempoj kun buntaj pompaj floroj kaj vegetala mondo en prospero pasis unu post alia, kaj post 17 printempoj mi denove ricevis ŝancon viziti la karmemoran montvilaĝon.

Mi denove iris el la gubernia urbo Ŝunĵi. Alta kamentubo de fabriko kaj ruĝaj fenestroj de novaj domoj anstataŭis la ruinon de la urbomuro.

Denove mi transpasis Ĉaŭbaj-riveron. Ferbetona ponto 100 metrojn longa anstataŭis la ligan pramon.

Ruĝa aŭtobuso kuradis kun mi sur asfalta ŝoseo borderita de poploj ĝis la piedo de la orienta monto.

Iu junulo kondukis min al la pordo de nova brika domo kaj laŭte kriis: “Maljuna sekretario, kamarado Liang venas!”

Malfermiĝis la ruĝe lakita pordo kun enkadrigitaj vitroj kaj aperis maljunulo kun grizaj haroj ĉe la tempioj kaj brile ruĝa vizaĝo. Mi rekonis en li la plej junan sekretarion de la tuta distrikto kamarado Hiaŭ.

Post lia dorso elvenis amaso da viroj kaj virinoj kun vizaĝoj ŝajne konataj...

Kiaj ŝanĝoj! Ŝanĝiĝis la fizionomio de la vilaĝo kaj ŝanĝiĝis la homoj. Sole pri la ĉefaj ŝanĝoj de la montvilaĝo de la fondo de la agrikultura kooperativo ĝis la starigo de la popola komunumo, maljuna Hiaŭ jam devis rakontadi al mi de post-tagmezo ĝis preskaŭ noktomezo, kaj eĉ tiam ankoraŭ ne povis diri ĉion.

Kiam ni, sidante unu kontraŭ la alia sub brila elektra lampo, estis libere parolanta pri la pasinteco kaj la estonteco fumante kaj trinkante teon, subite mi aŭdis ke en la apuda ĉambrego por kunveno iu diris mallaŭte:

“Maljuna sekretario, venu ĉi tien, mi volas diri ion al vi.”

Maljuna Hiaŭ puŝmalfermis la pordon kaj eliris, kaj tiam aŭdiĝis ekstere jena interparolo.

“Maljuna sekretario, mi petas la gvidantojn doni al mi ŝancon por servi al la popolo.”

“Multegaj estas ŝancoj por fari bonon al la popolo en tiel bona socio kiel la nia. Kion vi volas fari?”

“Mi volas fari ion bonan en kompenso al mia kulpo...”

“Rekte diru kion vi volas.”

“Mi volas lerni de la brigadestro...”

“Ekagu do.”

“Aj, mi falis pro du sitejoj da akvo kaj devis rampadi paŝon post paŝo...”

“Gravas ne la falo sed la vojo irata...”

“Maljuna sekretario, la brigadestro prenis al si la penon dum tiel multaj jaroj kaj nun li estas tiel okupata. Li estas tro lacigita. Estas mi, kiu devas porti akvon anstataŭ li. Jen vidu, ĉar mi ne agis aktive, la brigadestro kunvenis tri tagojn kaj la maljunulo ne ricevis eĉ guton da akvo dum la tri tagoj.”

“Neeble. Por ĉeesti kunvenon en la komunumo, la brigadestro faris bonan aranĝon pri ĉiuj aferoj gravaj kaj malgravaj, li certe ne povis neglekti la maljunulon.”

“Aja, maljuna sekretario, mi diru la veron, en la lastaj tri tagoj mi sidadis ĉe la pordo de la maljunulo de mateno ĝis vesperiĝo kaj vidis neniun kiu portis al li ĉe unu bovlon da akvo...”

“Ho, vi vere ne avaras vian zorgon! Bone, mi iros esplori iom poste.”

Mi aŭskultadis en la ĉambro kaj konstatis ke la viro estis Rastilo Han. Kiam maljuna Hiaŭ revenis en la ĉambron post la foriro de Han, mi demandis lin pri kiu ili interparolis.

“Pri Ma Ĉanghin,” Hiaŭ diris. “En la jaro kiam vi vizitis nin, jes, eble li ankoraŭ ne aliĝis al la Partio...”

Mi memoris Ma Ĉanghin, kaj mi demandis al li, ĉu Dua Onklo Han ankoraŭ vivas.

Maljuna Hiaŭ diris ĝoje: “Kvankam li estas jam pli ol 80-jara, tamen ankoraŭ tre fortika; li



ankoraŭ povas rigardi filmon, aŭskulti radion kaj printempe li tuttage promenas en la fruktoĝardeno, kokbredejo kaj infanĝardeno . . .”

Mi ekmiris kaj denove parolis kun li pri la bezono de akvo de la maljunulo.

Maljuna Hiaŭ diris kun admiro: “Maljuna Ma ĉiam persistas en portado de akvo por Dua Onklo Han. Li elektigis kiel estro de produkta grupo kaj post la kultura revolucio li fariĝis brigadestro, sed li ĉiutage portas du sitelojn da akvo por li, malgraŭ vento kaj pluvo.”

Nur tiam mi komprenis lian interparolon kun Rastilo Han en la apuda ĉambro.

Maljuna Hiaŭ meditis momenton kaj diris ekridinte: “Kredeble vi jam aŭdis la vortojn de Rastilo Han? Ŝanĝigis la tempo, ĉu li ŝanĝigis? En iuj aspektoj jes, sed en aliaj ne. En la pasinteco li sin ĵetadis rekte al posedaĵoj por ilin kapti, kaj nun?” Li montris al sia kapo kaj daŭrigis, “Li luktas kun ni pli multe ĉi tie—en politiko kaj ideologio!”

Li diris al mi daŭre, ke lastatempe la gubernia partia komitato laŭdis nombbron da malnovaj kadroj, kiuj ĉiam tenas sian revolucionan junecon kaj senĉese faras novajn kontribuojn. Ma Ĉanghin estas unu el ili. Oni diris, ke ankaŭ kamaradoj de la disaŭdiga stacio kaj teatra trupo volas veni al nia montvilaĝo por redakti programeron pri Ma Ĉanghin. Informiginte pri tio, Rastilo Han maltrankviligis, li timis ke oni malkovros la historion pri du siteloj da akvo kaj prenos lin kiel negativan ekzemplon

por propagandi, tial li faris la farson por iom nigrigi Ma Ĉanghin kaj iom sin beligi. Maljuna Hiaŭ diris: “Pri portado de akvo mi povas diri kun certeco, ke eĉ se maljuna Ma forgesis, lia edzino tamen ne povas forgesi — ili enamiĝis unu al la alia en la jaroj de antaŭensaltego kaj lia edzino estas homo pli varmkora . . . Nu, ni iru demandi Duan Onklon Han, ĉu oni portis akvon por li en la lastaj tri tagoj.”

Ni kune iris sur la strato plena je aromo de fruktarbaj floroj.

Nokte, brile lumis la fenestroj de la komunumanoj.

Antaŭ ni aŭdiĝis ridoj, kiuj bloviĝis al ni kvazaŭ vento de ĝojo.

Maljuna Hiaŭ prilumis aron da gejunuloj per sia elektra torĉo kaj demandis: “Pro kio vi faras tian bruon?”

“Ni iris al Dua Onklo Han por peti, ke li rakontu al ni la historion de la vilaĝo,” diris la knabino en la fronto.

“Vi estas lertaj por ĝeni lin,” diris maljuna Hiaŭ, “sed kial ne helpis lin per viaj manoj?”

Evidente la kritiko estis maljusta kaj la gejunuloj ekkriis preskaŭ samtempe:

“Vi estas maljusta, maljuna sekretario. Ja kiu el la vestoj ĉu vatitaj aŭ nevatitaj de Dua Onklo Han ne estas farita de ni junulinoj?”

“Ni ĉiuj lin helpis per niaj manoj en konkuro! Ĉu stukado de lia domo aŭ balaado de lia korto, ĉio estas farita de ni junuloj!”

“Ĉion ĉi tion mi scias,” maljuna Hiaŭ intence diris laŭte. “Temas pri portado de akvo.”

Subite aŭdiĝis post ni knarado pli kaj pli proksimiĝanta kaj pli kaj pli klara.

Maljuna Hiaŭ ŝanĝis la direkton de sia elektra torĉo.

En la arĝenta elektra lumkolono mi vidis du firme moviĝantajn piedegojn kaj du rondajn malnovtipajn sitelojn el cipresaj tabuloj; tuj poste ni vidis konatan vizaĝon kaj paron da brilaj okuloj...

“Maljuna Ma!” emocie kriis maljuna Hiaŭ ne povante sin deteni.

Ma Ĉanĝhin tuj haltis kaj rigardante lin demandis kun miro: “Jam estas tiel malfrue, ĉu vi ankoraŭ ne enlitiĝis?”

“Diru al mi unue,” diris maljuna Hiaŭ ankoraŭ fikse rigardante la vizaĝon de Ma Ĉanĝhin, “ĉu vi ĵus venis de la komunumo?”

Ma Ĉanĝhin diris: “Ĉar post diskutado estas libera tempo, tial mi revenas kaj mi reiros morgaŭ por tie preni matenmanĝon, kaj mi malfruos por nenio.”

Maljuna Hiaŭ ŝajne iom surpriziĝis: “Ĉu vi revenadis ĉiutage en la lastaj tri tagoj por porti akvon?”

Ma Ĉanĝhia diris: “Tio ĉi ja estas nenio krom hardado.”

“Ekde morgaŭ,” diris maljuna Hiaŭ, “vi ne revenu antaŭ la finiĝo de la kunveno.”

“Tion mi ne povos,” diris Ma Ĉanĝhin, “ni ja estas homoj kiuj ĉiam tenas sian vorton.” Tion dirante li grandpaŝe ascendis la ŝtupetaron, puŝmalfermis la pordon per unu sitelo kaj eniris nehaste.

Kiam la lignaj siteloj kun ondetanta klara fontakvo preterpasis antaŭ miaj okuloj, en mia koro bolis emocio kaj mi kvazaŭ vidus vastan senliman maron. Jes, du siteloj da akvo ja estas nur bagatelo malgrava. Tamen laŭdinda estas la spirito, ke dum miloj da tagoj de la pasintaj 18 jaroj, de mezaĝo al maljuneco li ĉiam agas same, ĉu kiel ordinara kamparano aŭ gvida kadro de brigado!

.....

Tri tagojn poste, mi aŭdis, ke Ma Ĉanĝhin revenis al la vilaĝo post fino de la kunveno, kaj mi senprokraste iris viziti lin en frua mateno.

Kiam mi trairis fragmitaron, mi vidis ke Ma Ĉanĝhin estis ĉerpanta akvon el puto per sitelo, kaj gejunuloj estis klopodantaj transpreni de li la lignajn sitelojn kaj portvehton. Kaj mi aŭdis ilian interparolon.

“Longa vojo elprovas la forton de ĉevalo, longa tempo elprovas la koron de homo; kiaj vi efektive estas, mi kaj ĉiuj povos vidi nur en praktiko...” diris Ma Ĉanĝhin.

“Estu trankvila. Ni povos nur transpreni la revolucionan taskon de via ŝultro, sed ne la egoisman ŝarĝon el la manoj de Rastilo Han.” Ĉar tiam ekaŭdiĝis la bela laŭta melodio de *Himno al la Patrolando*, mi ne povis aŭdi kion ili diris poste.

En la flamanta matenruĝo, la junulino sukcesis transpreni la sitelojn kaj portvehton kaj ascendis la ŝtupetaron kun la akvoplenaj siteloj ritme svingiĝantaj supren kaj malsupren ĉe ambaŭ finoj de la vekto; la junulo ankoraŭ parolanta kun Ma Ĉanĝhin rimarkis tion kaj tuj kuris sur la ŝtupetaron.

Ma Ĉanĝhin kun sane ruĝaj vangoj sekvadis per siaj ridetantaj okuloj la du homojn de la nova generacio kiuj transprenis de lia ŝultro la portvehton.

Mi ebriiĝis de la kortuŝa sceno...

Kvazaŭ Preciza Horloĝo

F RUMATENE ankoraŭ pluvegas. Kamaradoj de la dua altforna grupo de la Hingtaj-a Ferŝtala Fabriko de Hebej-provinco faras preparojn por laboro interparolante:

“En tia pluvego majstro Miaŭ certe revenos ne ĝustatempe!”

“Li do venos sendube post la oka.”

Rigardante brakhorloĝon iu kamarado diras: “Ne, majstro Miaŭ certe venos ĝustatempe.”

Majstro Miaŭ Hajjun estas sinoferema kaj disciplinema en la laboro por la socialisma konstruado. En multaj jaroj li venas al la fabriko ĉiam antaŭ la komenco de laboro.

Jen, Miaŭ Hajjun plene malsekigita de pluvo venas al la fabriko kiel antaŭe je 15 minutoj antaŭ la oka.

Antaŭhieraŭ posttagmeze Miaŭ Hajjun havis libertempon por viziti sian hejmon. Hieraŭ vespere li antaŭdifinis la sonoratan signalon de vekhorloĝo je la kvina kaj diris al sia edzino: “Morgaŭ je la kvina vi preparu por mi manĝon, ĉar mi foriros je la sesa por la okahora deĵoro.” Kapjesis lia edzino. Tamen en la profunda nokto abrupte ekpluvegis kun fulmoj kaj tondroj. Miaŭ Hajjun vekiĝis de tio kaj diris al sia edzino: “Preparu manĝon, mi volas foriri pli frue.”


“Kiel vi aliros nebicikleble en tia vetero?”

“Piede.”

Aŭdinte tion, lia edzino diris tuj: “Tiel granda estas la pluvo kaj tiel longa la distanco, kompreneble vi povas prokrasti reveni ĝis morgaŭ.”

Miaŭ Hajjun diris paciencie: “Ni laboristoj devas esti disciplinemaj en laborado. Ĉu mi povas esti tia, se mi ne iros al laboro nur pro malbona vetero!”

Malgraŭ vento kaj pluvo li piede rapidis dudek kilometrojn sur kota vojo kaj atingis la fabrikon antaŭtempe. Vidante Miaŭ Hajjun la laboristoj laŭdas: “Majstro Miaŭ ja estas kvazaŭ preciza horloĝo.”



NOVAJ SUKCESOJ EN PRINTEMPA FORSTUMADO

Utiligante la bonan ŝancon de printempo, la vastaj amasoj de diversaj urboj kaj kamparo de nia lando aktive disvolvis forstumadon kaj atingis novan sukceson en verdigo de la patrolando. Laŭ la statistiko de la koncerna fako farita antaŭ

la meza tagdeko de aprilo, la totala areo de plantitaj arboj en 27 provincoj, municipoj kaj aŭtonomaj regionoj jam atingis 66 procentojn de la kurantaj forstuma plano difinita de la ŝtato, kaj kreskis je 6 procentoj ol tiu de la sama periodo de la pasinta jaro. La provincoj Guangdong, Hunan, Hubej, Fugian, Gianghi, Ĝegiang, Giangsu kaj Anhuj, Guanghi-a Ĝuangnacia Aŭtonoma Regiono kaj la urbo Ŝanhajo, kie printempo venis pli frue, jam superplenumis la tutjaran forstuman taskon.



Verkistino Hie Binghin

BING HIN:

Jihikjuĝen

pri Si Mem

Jihikjuĝen, filino de tibeta servutulo, nun estas studentino de la arta fakultato de la Centra Instituto de Nacimalplimulto de Pekino. Ĉi sube estas noto de verkistino Binghin pri parolo de Jihikjuĝen al ŝi.

—La Red.

“Pardonon, instruistino, ke mi malfruiĝis. Mi ekzercadis min en ludo de violonĉelo kaj forgesis la pason de tempo.

“Antaŭ kelkaj tagoj, vi demandis pri mia mizera infaneco kaj mia hodiaŭa feliĉa vivo esti studentino ĉe Prezidanto Maŭ. Tiam mi faris nur ĝeneralan priparolon kaj mi tiel emociiĝis, ke mi ne sciis de kie komenci! Instruistino, en la malnova socio de Tibeto ja ne nur mi sola dronis en mizero kaj suferoj kiel sklavo kaj senhelpa orfo!

“Pri miaj karaj gepatroj nun mi havas nur malklaran memoron. Mi tamen neniam povos forgesi la sangajn tranĉvundojn. Mia patrino mortis en 1957 post kiam ŝi ricevis batadon de la mastrosinjoro, kiu devigis nin repagi ŝuldon, kaj ŝia kadavro estis ĵetita en riveron. Post kelkaj tagoj, iu knabo kolektanta bovfekaĵojn diris al mia patro, ke la kadavro de mia patrino putriĝis sur la apudrivera malprofundejo kaj estis manĝata de hundoj. Mia patro tuj rapidis tien kaj puŝis la kadavron en la riveron, tiel ke ĝi estis forportita de la fluo. En la sekvinta jaro, kiam mia patro gardis ĉevalojn por la mastrosinjoro, iu ĉevalo lamiĝis. La mastro kulpigis mian patron pri tio kaj solide lin batis. Tiam mi loĝis kun paĉjo en la stalo kaj li ĉiam revenis malfrue. Tiunokte, mi vekigis en noktomezo, kaj ne trovinte paĉjon per palpado mi sidiĝis. Mi atendis kaj atendadis. Tiel longa kaj tiel malluma

estis la nokto. Mi ekploris pro maltrankvilo kaj timo. Kiam aliaj servutuloj aŭdis mian ploradon, ili venis por min konsoli kaj forviŝis por mi la larmojn. Oni diris al mi, ke paĉjo iris kun la mastro al Lasao kaj li revenos post kelkaj tagoj. Sed post kvar tagoj ili diris al mi, ke paĉjo mortis kaj lia kadavro estis ĵetita ankaŭ en la riveron...

“De tiam nur mi sola restis el mia familio! Mia patrino naskis 7 gefilojn, sed ĉiuj aliaj mortis de malsato aŭ malsano. De mia 5-6-jara aĝo mi jam laboris kiel sklavo kune kun mia patro kaj servis al la infanoj de la mastrosinjoro, kiuj estis pliaĝaj ol mi. Kiam ili volis sin amuzi per rajdado de bovo, ili ordonis min surgenuiĝi kaj surboviĝis tretante mian dorson; se mi ne lasis ilin tion fari, ili tiris al mi la orelojn kaj sur mi rajdis! Ekde mia sepjara aĝo, mi paŝtis por la mastrosinjoro. Paŝtante sola pli ol 200 ŝafojn en dezertejo, mi tre maltrankvilis! Tiam mi povis akiri ĉiutage nur malgrandan bovlon de farunaĵo el sekalo kaj brano, kaj mi portis nur kolektitajn ĉifonojn. Mi neniam havis ŝuojn. En vintro miaj piedoj sangis de frosto kaj paĉjo faris al mi feltajn botojn el lano kolektita de sur arbustoj. Post la morto de mia patro, mi jam ne povis havigi al mi eĉ ĉifonojn kaj feltajn botojn!

“Tiam mi komencis vagadi en la vilaĝo almozpetante de domo al domo. Nur malriĉuloj simi-

laj al mi donis al mi kulereton da sekala manĝaĵo, kio estis ĉio, kion ili disponis; sed la riĉuloj, anstataŭ doni al mi almozon, min batis kaj insultis ke mi estas mallaborema, kaj min forpelis.

“Mi naskiĝis en la jaro 1950. En la sekvanta jaro Tibeto jam estis pace liberigita kaj la Ĉina Popola Liberiga Armeo jam marŝis en Tibeton kaj sur la supro de la neĝkovritaj montoj jam aperis aŭroro. Sed la mastrosinjoroj ankoraŭ obstine kontraŭstaris. Ili trompis la amasojn dirante ke la ĈPLA-anoj estas hommanĝantaj diabloj kaj malpermesis, ke ni kontaktiĝu kun ili. Turmentate de malsato kaj frostoj, tiam mi ŝtele iris al la kazerno de ĈPLA malgraŭ danĝero kaj petis manĝaĵon de armeanoj per mangestoj. Mi vere ne atendis, ke ili traktis min eĉ pli bone ol miaj parencoj! Ili donis al mi manĝaĵon, vestojn kaj ŝuojn, kaj pridemandis mian vivhistorion kaj klarigis al mi revolucionan teorion per helpo de interpretisto. Malkaŝinte mian viziton al ĈPLA, infanoj de la mastrosinjoro min forportis kaj solide batis, kaj timigis min, dirante ke ili forpelos min el la vilaĝo, se mi denove vizitos ĈPLA. Sed ‘Prezidanto Maŭ estas ruĝa suno sur la ĉielo kaj ĈPLA estas radioj de la suno’, ja kia forto povas bari al mi, kiu estis tenata en malluma kaverno kiel malliberulo, kuron al la varma sunlumo?”

“En 1959, la ribelo de la feŭdaj mastroj estis subpremita kaj komenciĝis la demokratia reformo en Tibeto. La miliono da servutuloj vidis lumon kaj la brilo de la Partio kaj Prezidanto Maŭ lumigis nian hejmlokon ĉe la neĝa montaro. Divido de tero, ŝafoj kaj bovoj kaj energia laborado por produkto... ĉie aŭdiĝis kantoj!”

“Ankaŭ mi, kvankam juna, ricevis teron, bovojn kaj ŝafojn kaj gvidanta kamarado admonis ke mi vivu ĉe mia onklino, kiu antaŭe estis sklavino. En 1960, mi eniris elementan lernejon starigitan de la popolo. En 1964 mi studis kvar monatojn en instruista kurso en Lasao. En 1965 mi aliĝis al migranta propaganda taĉmento. Ni mem redaktis diversajn programerojn prenante niajn pasintajn kaj aktualajn travivaĵojn kiel materialojn kaj ni mem ilin prezentis. Kvankam mallongaj estis niaj vivhistorioj, tamen el ili ni jam povis trovi neelĉerpeblajn krudmaterialojn kaj neniam elĉerpeblaj estas ankaŭ niaj kantoj pri la nova vivo!”

“Por diri mallonge, en novembro de 1971 mi estis elektita por lerni en la arta fakultato de la Centra Instituto de Nacimalplimatoj en Pekino. Vere nepriskribebla estis mia emocio en tiu tempo!”

Komparu la pasintecon kun la nuntempo, hodiaŭ orfo, kiu antaŭe eĉ neniam aŭdis la vorton lernejo, tamen povas studi en supera lernejo ĉe Prezidanto Maŭ. Ĉu mi povas ne firme memori, de kie venis mia feliĉo?”


“Antaŭ eniro en la lernejon mi jam decidis enkore, ke mi nepre ne perdos la penlaboremon kaj malluksemon de la proletaro. Mi klopodis unuiĝi kun la kunlernantoj kaj helpi alian por bone plenumi la taskon difinitan de la Partio al ni. Mi ofte pensis kaj diris al miaj kunlernantoj, ke nun en la mondo ankoraŭ troviĝas multe da gefratoj suferantaj kiel ni en la malnova socio, kaj ilin subteni estas nia devo. Ni devas senĉese altigi nian politikan kaj ideologian konscion kaj nepre ne lasi la malamikon nin repuŝi en la malnovan socion por denove nin suferigi.

“Instruistino, kvankam mi havas tre firman decidon kaj klaran celon, ankaŭ la instruistoj kaj kunlernantoj min kuraĝigas dirante ke mi progresas tre rapide en ideologio kaj lernas kun bona rezulto, sed mi mem ofte pensas ke mi ankoraŭ tre malmulte faris ol kiom la Partio postulas. Mi tamen havas kuraĝon kaj memfidon, ĉar en mia koro ĉiam brilas lumturo, t.e. la brila Maŭzedongpenso. Mi nepre spitos la malfacilojn, lernados kaj min ekzercados diligente, meti mian ardan entuziasmon en la fingrojn kaj brakojn, por ke mia violonĉelo manifestu ĉion en mia koro en la simfonio...”

“Instruistino, jam sonoras la horo por vespermanĝo. Multan tempon mi rabis de vi. Se vi ankoraŭ volas ion scii de mi, min alvoku refoje. Escepte de la tempo por leciono aŭ laboro, ĝenerale mi troviĝas en la ĉambro por ekzerco de muzikiloj, ankaŭ en dimanĉo. Ĝis revido, instruistino!”



Gajaj Kantoj kaj Dancoj Dediĉitaj al la Partio



Danco de Unuiĝo



Lakta Teo al Prezidanto Maŭ (danco)

Supre dekstre: Ji-oj Amas Siajn
Soldatojn (kanto kun gestado)

En Vagonaro al Pekino (danco)







Dank' al la Brila Suno (danco)



Nekalkuleblaj Estas la Favoroj
de Prezidanto Maŭ (virina
solo)

Portado de Karbo al ĈPLA-
anoj dum Neĝado (danco)





La Tuta Lando Estas Mia Hejmo (kanto kun gestado)



Kamelioj Floras al la Matena Suno (danco)

Brilas la Ruĝaj Lanternoj sur Tian-anmen-pordego (kantodanco)



Pri la Minada Instituto de Siĉuan

HUAJING-MONTO en la orienta parto de Siĉuan-baseno estas abunda je karbo. Ŝaktoj estas konstruataj tie unu post alia kaj kun tio aperis la novtipa altlernejo Minada Instituto de Siĉuan.

La instituto antaŭe nomiĝis Pekina Minada Instituto. En la jaro 1970, sekvante la instruon de Prezidanto Maŭ **“revolucio devas esti farita en edukado”** kaj laŭ praktika bezono, ĝi translokiĝis de granda urbo al Huajing-monto. Por ekspluati la subteran riĉfonton de la patrolando kaj kulturi la junan generacion, oni decidis bone funkciigi tiun novtipan altan lernejon, disvolvante la revolucionan tradicion de sinapogo sur la propraj fortoj kaj penema lukto en malfaciloj.

En la lastaj pli ol du jaroj, sub varma helpo de la lokaj amasoj ili konstruis domojn unuj post aliaj, utiligante ŝtonojn kiel ĉefan materialon. La instituto situas najbare de ŝaktoj, ĝiaj instruistoj kaj studentoj ofte laboras kune kun la ministoj. Tio ja estas profunda revolucio por la malnova eduka sistemo de disiĝo de praktiko, fizika laboro kaj amasoj!

ŜANĜIĜO DE LA SPIRITA FIZIONOMIO

La Minada Instituto de Siĉuan, kiel revolucia fornego, hardas la instruistojn kaj studentojn. Samtempe kun la konstruado de la instituto la instruistoj komencis doni lecionojn kaj klopodas efektiviĝi la penson de Prezidanto Maŭ pri la revolucio en edukado. Ilia spirita fizionomio estas ŝanĝita kaj ilia politika konscio rapide altigita.

Vicprofesoro Huang Juanping estas bona ekzemplo. En 1964 la Fuŝun-a Karbominejo invitis lin por ke li helpu la minejon solvi la problemon pri aerumado de ŝaktoj. Tiam li pensis en si: **“Mi estas profesoro, do sufiĉas por mi prelegi pri**

la teorio kaj principoj por aerumado, sed solvi la praktikajn problemojn ne estas mia afero.” Li ne iris en ŝaktojn por fari praktikan enketon nek konsiliĝis kun kadroj kaj laboristoj. Li skribis tekston de lekcionoj per kvin tagoj kaj prelegis sep tagojn pri diversaj teknologioj de Ĉinio kaj fremdaj landoj pri aerumado en ŝakto, sed ne respondis la praktikajn demandojn. Laboristoj diris: **“La prelegoj de la profesoro ne povas nin helpi en solvo de la nuna problemoj!”**

En la Granda Proletara Kultura Revolucio, oni kritikis la reviziisman edukan linion de Liu Ŝaŭki, el kio Huang Juanping ricevis profundan edukon kaj vidis, ke la malnova eduka sistemo devas esti reformita. Sed mankis al ili sperto por konduki edukan revolucion. En somero de 1970 Huang Juanping venis al la karbomineja regiono de Huajing-monto. **“Ho, ĉie estas monto! Ĉu oni povas funkciigi altlernejon en tia loko?”** li pensis pretervole. En la komenca tempo de konstruado de la instituto ili loĝis en matobudoj. Unuflanke, la instruistoj, oficistoj kaj laboristoj de la lernejo laboris kune kun la ministoj por konstrui ŝaktojn, kaj aliflanke, helpate de lokaj amasoj, ili hakis ŝtonojn, faris kalkon kaj cementon kaj konstruis ŝoseon kaj domojn por la instituto. Ĉie bolis revolucia entuziasmo. Li estis profunde korduŝita de la revolucia entuziasmo por konstrui socialisman altan lernejon.

Vintre de 1970, la instituto decidis ke Huang Juanping partoprenu en la konstruado de la karbo-baseno de Huajing-monto kaj solvu la problemon de aerumado de ĝiaj ŝaktoj. Tiufoje li agis multe malsame ol antaŭe en la Fuŝun-a Karbominejo. Li decidis kombini teorion kun la praktiko kaj efektive solvi la problemon. En kuna vivado kun ministoj li trovis ke ministoj havas riĉajn spertojn de praktiko, kaj en kuna fizika laboro en ŝakto li per-

sone vidis, ke malbona aeruma ekipaĵo malutilas al la sano de la laboristoj kaj al la produktado. Por projekti aeruman sistemon precize kaj racie, li persone esploris ĉiujn galeriojn ĉu novajn aŭ malnovajn. Tage li faris projektadon kune kun laboristoj kaj teknikistoj, vespere li diskutadis kun kaj prelegis al la lernantoj de la kurso pri sekuriga aerumado en laborista loĝejo. Kvankam li lekcias plurjare pri aerumado de ŝaktoj, tamen neniam li faris tion tiel konforme al la praktiko kiel en tiu fojo.

START-PUNKTO DE REFORMO

En aprilo de 1972 la Minada Instituto de Siĉuan akceptis lernantojn el laborantaj popoloj de kvin naciecoj, inter kiuj troviĝas multaj spertaj ministoj. Vidinte tiujn viglajn gejunulojn, la instruistoj tre ĝojis kaj decidis kontribui sian forton por bone funkciigi la instituton, sekvante instruojn de Prezidanto Maŭ.


Por bone kulturi studentojn, oni bezonas bonajn lernolibrojn. En la lastaj pli ol du jaroj, la instruistoj ofte iris en fabrikojn kaj minejojn por partopreni en produkta praktiko kaj fari enketadon kaj esploradon, kaj faris reformon al lernolibroj kune kun laboristoj kaj teknikistoj.

En la pasinteco la instituto starigis tri kursojn "geologia historio", "paleontologio" kaj "karbo-

fosilioj" kaj donis ilin en tri lernojaroj per 240 lernohoroj, dume la lernantoj devis parkere lerni la specojn kaj nomojn de pli ol 200 fosilioj. Tiam iuj ministoj proponis ke la instituto kunigu la tri kursojn en unu. Sed iuj instruistoj diris: "‘Paleontologio’ pritraktas organikaĵojn, dum ‘geologia historio’ neorganikaĵojn, ili estas tute malsamaj. Kiel oni kunigu ilin?" Post kiam la instituto translokiĝis al Huajing-monto, la propono estis denove elmetita. Ĉu ili povos esti kunigitaj? Kiel tion fari? La instituto sendis du instruistojn al karbominejo por fari esploron. Kune kun prospektoroj ili faris pli ol 4 monatojn da ĝenerala prospektorado de karbobaseno kaj okazigis pli ol dek kunsidojn por peti de laboristoj opiniojn pri kompilado de lernolibroj. Laboristoj diris ke la tri kursoj, kiuj diferencas unu de la alia kaj interrilatas unu kun la alia, estas kunigeblaj. Ili proponis samtempe ke en instruado de la kunigota kurso oni devas emfazi fosilian ekspertizon en praktika prospektorado. Tiuj laboristoj rakontis jenan okazaĵon: Iufoje, ili trovis fosilion dum prospektorado, kvankam inter ili sin trovis studentoj diplomitaj el fakoj de ĝenerala geologio kaj karbobasena geologio, tamen neniu konis tiun fosilion. Kial? Ĉar la instruistoj de la instituto instruis al ili per relative normaj fosilioj, tiel ke ili ne konis nenormajn fosiliojn, kvankam ili parkere lernis la nomon de centoj da fosilioj. La rakonto profunde tuŝis la du instruistojn. Ili kune kun laboristoj anali-

Vicprofesoro Huang Juanping (la unua de maldekstre) konsiliĝas kun ministoj por solvi la problemon de gasoŝpruco.





Novaj domoj memkonstruitaj sur monto

zis la rolojn, poziciojn kaj interrilatojn de la tri kursoj en ĝenerala prospektorado kaj rearanĝis ilin laŭ nova sistemo. Ili kunigis la tri kursojn en la kurson "stratigrafio" kaj faris provan prelegon kaj senĉesan bonigon en la praktiko.

Kompilinte bonan lernolibron, oni ankoraŭ devas havi bonan instru-metodon por kulturi studentojn kapablaj lerte analizi kaj solvi problemojn. Kun revolucia entuziasmo vicprofesoro Ŝa Kimin decidis provi sugestan didaktikon. Sed ŝi aplikis eksplikajn didaktikon jam pli ol 20 jarojn, kaj ŝi devis klopodi por ŝanĝi la malnovan kutimon je ĉiu paŝo. Foje, studentoj venis al Ŝa Kimin kaj diris: "Profesorino, klarigu al ni kiel antaŭe, ĉar ni mem ne povas kompreni la tekston!" Ŝi denove faris al ili detalan klarigon. Post tio la studentoj ŝajne komprenis, sed ŝi rimarkis poste dum kontrolo de iliaj ekzercoj, ke al parto de ili ankoraŭ mankas vera kompreno pri ŝia lekcio. Ŝa Kimin pensis, ke ŝi devas eltrovi la kaŭzon. Informiginte ke nemalmultaj studentoj mem lernis teknikan teorion kaj faris teknikan renovigon en praktika laboro, ŝi pensis ke ĝusta direktado povas konduki ilian analizon kapablon al la nunaj kursoj. Sekve de tio ŝi donas apartan atenton al kombino

de sia lekcio kun praktiko, kaj ŝi samtempe plifortigis sian apartan helpon al iuj studentoj laŭ ilia malsama stato. Post certa tempo de tia praktiko la studentoj diris: "Tiu didaktiko povas bone komprenigi kaj memori al ni la lernitajn lecionojn."

La sperto de Ŝa Kimin estis rapide disvastigita en la tuta instituto. Multaj instruistoj serioze reformis sian didaktikon, kio estis multe bonvenigata de la studentoj.

VERA KONO VENAS DE PRAKTIKO

En la komenco de la kuranta jaro, kiam la ŝakto n-ro 3 de la suda sekcio de Huajing-monta Karbominejo estis komenonta ekspluati karbotavolon, Ju Kihiang, instruisto de la karboekspluata fako, kaj aliaj kune kun la laboristoj interkonsiligis por trovi metodojn por anticipi ellasi gason por garantii sekuran produktadon. Konsiderante ke Ju Kihiang estas sperta en mezuro, analizo kaj kalkulo de gaso, oni pensis ke li certe povas jungi gason kune kun la laboristoj.

Priparolante la studon de Ju Kihiang k.a. pri jungo de gaso, oni devas retrorigardi la vojon de

sciencia studo iritan ĉirkaŭ la translokiĝo de la instituto. En la pasinteco, sub influo de la reviziisma linio ĝia sciencia studo disiĝis de la praktiko. Ĝi konstruis eksperimentejon por hidraŭlika karbo-ekspluatado, kiu alportis malmulte da fruktoj pro sia maltaŭgeco. Post la translokiĝo oni ĝustigis la direkton de sciencia studo. Ili profundiĝis en fabrikojn kaj karbominejojn kaj prenis la urĝe solvendajn problemojn en la karba produktado kaj teknika disvolviĝo kiel siajn objektojn de sciencia studo.

La problemo de gasoŝpruco en karbominejoj de la sudokcidenta regiono estas relative serioza fenomeno, kaj la spertoj de laboristoj en batalo kontraŭ ĝi devis esti urĝe resumitaj kaj altigitaj al teorio. Somere de 1972, la instituto sendis Ju Kihang kaj aliajn kvin instruistojn al Nantong-karbominejo de Ĉongking por studi la problemon de gaso. Alveninte tien ili persiste tenis praktikon en la unua loko, laboris kaj esploris kune kun laboristoj pli ol 100 gas-akcidentojn de tiu karbominejo registritajn antaŭ kaj post la Liberiĝo. Maljunaj laboristoj detale rakontis al ili pri mul-

taj akcidentoj kaj teknikistoj donis grandan kvanton da konkretaj materialoj pri gas-akcidentoj. Kune kun laboristoj kaj teknikistoj, Ju Kihang kaj aliaj esploris ŝaktojn kaj legis materialojn por resumi praktikajn spertojn kaj koni leĝojn de apero de gaso. Post duonjara klopodo ili unuapaŝe formulis leĝon pri elŝpruco de gaso, faris teorian diskutadon pri ĝia kaŭzo kaj ĝia klasifikado kaj elmetis siajn novajn opiniojn.

Dum la konstruado kaj instruado en la pasintaj pli ol du jaroj, la instituto studis 14 sciencajn objektojn, el kiuj 4 jam estis sukcese finitaj.

Hodiaŭ en la Minada Instituto de Siĉuan regas revolucia atmosfero. En resumo de la laboroj, ĝiaj instruistoj, studentoj kaj oficistoj diris emocie: "Forlasinte la grandan urbon, ni funkciigas nian instituton en karbomina regiono sentante nin kva-zaŭ fiŝoj en akvo, kaj rompis la situacion de disiĝo de praktiko, fiziklaboro kaj amasoj." Ili nun pli bone funkciigas la instituton laŭ la proletara eduka linio de Prezidanto Maŭ, kombinante la klasan batalon, produktan batalon kaj sciencajn eksperimentadon!

Instruistinoj direktas la tibetajn gestudentojn en ilia lernado.



Bonaj Pilkoj Zorge Faritaj per Lertaj Manoj

TRE multaj estas la specoj kaj bona estas la kvalito de la pilkoj kun la marko Orpokalo, produktitaj de la Tiangin-a Liŝeng-fabriko de Sportaj Instrumentoj. Ili ne nur kontentigas la enlandajn bezonojn, sed ankaŭ estas eksportataj al multaj aliaj landoj kaj regionoj.

La kreskado de la disvenda kvanto kaj la plivastiĝo de la merkato de Orpokalo-pilkoj senĉese stimulas la laboristojn kaj oficistojn de tiu fabriko. Ili strikte kunligas la kvaliton de la Orpokalo-pilkoj kun la prestiĝo de la patrolando kaj faras siajn plej eblajn penojn por bone produkti ĉiun pilkon.

LERTA PILKOFARISTO ĜANG ĜIGUANG

En tiu fabriko estas 38-jara majstra pilkofaristo Ĝang Ĝiguang, li laboris jam 22 jarojn. De la jaro 1958, li kudris dekmilon da pilkoj sen subnorma aŭ maltaŭga produktaĵo kaj li estis en sinsekvaj jaroj elektita kiel altkvalita kaj grandkvanta produktanto kaj labormodelo de la tuta urbo. Ankaŭ laboristoj de la fabriko nomis lin "ĉiam sukcesa pilkofaristo."

Pri lia laboro ĉiam sukcesa, oni povas citi jenan ekzemplon. Foje la kontrolisto de la laborejo devis transposteniĝi. Ĉar li longe kunestis kun Ĝang Ĝiguang, li sciis ke la lasta ĉiam laboras atente kaj garantiata estas la bonkvaliteco de ĉiu el liaj produktaĵoj. Tial li diris al la nova kontrolisto je sia foriro: "La pilkoj kudritaj de Ĝiguang estas certe bonaj kaj vi ne bezonas maltrankviliĝi pro lia laboro." Aŭdinte lian diron, la nova kontrolisto iom dubis. Li faris atentan kontrolon pri la pilkoj kudritaj de Ĝang Ĝiguang kaj trovis en pli ol 50 sinsekvaj tagoj, ke Ĝang Ĝiguang ne

nur kudris pli multajn pilkojn ol la kamaradoj, sed ankaŭ produktis neniu subnorman aŭ maltaŭgan produktaĵon. Nur tiam li konvinkiĝis kaj diradis al aliaj: "Ĝang Ĝiguang vere meritas la nomon 'ĉiam sukcesa pilkofaristo'."

Por bone kudri pilkojn, Ĝang Ĝiguang multe klopodis en lernado. Foje en iu jaro okazis Kunveno por Demonstrado de Avangardaj Teknikoj en la fabriko. En la kunveno, Ĝang Ĝiguang vi-

Ĝang Ĝiguang en laboro



dis, ke maljuna laboristo Niu Lanting bone kundudris pilkon tirante la fadenon per la tenilo de la pikilo volvinte la fadenon ĉirkaŭ ĝi je unu cirklo. Li pensis, ke li mem devas du-cirkle volvi la fadenon ĉirkaŭ la pikil-tenilo por firmigi la kudrerojn. Ĉiutage unu persono kudras kelkajn pilkojn kaj por kudri ĉiun pilkon oni devas fari milon da kudreroj. Kiom da tempo do oni malŝparas, se unu plian volvon oni devas fari por ĉiu kudrero! Post la kunveno, li petis majstron Niu instrui al li la sperton. En la komenco, lia provo iris malglate kaj la fadeno glitis je ektiro. Sed li persistis en ekzercado kaj post duona monato li jam bone mastris la teknikon, kaj povis fari bonan pilkon per tia kudrado. Ĝuste en tia maniero Ĝang Ĝiguang atente lernis la sperton de la kamaradoj kaj klopodis altigi sian teknikon.

Oni demandis Ĝang Ĝiguang, kiel li povas ĉiujare produkti multe kaj bonkvalite. Ĝang respondis: "La Orpokalo-pilko prezentas la produktan nivelon de pilkoj de nia lando, tial ni devas fari neniun kudreron malzorgeme."

Nun Ĝang Ĝiguang estas elektita kiel vicestro de la revolucia komitato de la fabriko, li tamen ankoraŭ ofte iris en la laborejon por kudri pilkon per elpremita tempo. Lia konstanta zorgemo en laboro jam estas disvastigita inter la laboristoj. Nun 70% de la laboristoj de la tuta fabriko jam sukcesis kudri pli ol 8,000 pilkojn sen subnorma produktaĵo.

SEVERA KONTROLO JE ĈIU PROCEDO

Ĉiu Orpokalo-pilko devas trapasi ĉ. cent procedojn de la fela tanado ĝis enkestiĝo por liveriĝi al la merkato. Kaj la laboristoj de ĉiu procedo, same kiel la kudristoj, severe kontrolas la kvaliton de sia laboro.

La feloj uzataj de la fabriko devenas de diversaj lokoj kaj ili diferencas unuj de aliaj. Kaj diferenco troviĝas ankaŭ inter la ledoj de brutoj viraj kaj inaj, junaj kaj maljunaj. La laboristoj severe klasifikas ilin, faras en pilkoledon per malsamaj procedoj laŭ iliaj malsamaj ecoj kaj difinas la specon de la farata pilko laŭ la malsama kvalito de ĉiu peco de led.

Ĉiu Orpokalo-pilko estas farata el 8 ĝis 42 pecetoj da led. Por ke la pilkoj ne deformiĝu, oni devas zorgi ke ĉiu peceto de led estu kun sama elasteco. Tamen led-pecoj sur la dorsa, abdo-

mena kaj postaja partoj estas malsamaj en elasteco. La laboristoj atente distingas la malsamajn partojn dum detranĉado, elektas la ledpecojn de samaj partoj laŭ la difinita pezo por ĉiu pilko kaj ilin markas antaŭ ol ilin sendi al la kudrejo. Dank' al tia aranĝo, oni povas garantii la unuecon de la normoj de diversspecaj pilkoj.

Por fari severan kontrolon je ĉiu procedo, la fabriko ne nur havas siajn specialajn kontrolistojn, sed ankaŭ mobilizas ĉiujn laboristojn, ke ili mem faru zorgan kontrolon por frue trovi kaj korekti erarojn.

Foje kiam maljuna laboristo Hjue Ĵujven estis kudronta pilkon el 18 ledpecetoj, li trovis ke 3 el ili aspektas malsame ol la aliaj 15. Li sciis ke oni miksis la ledpecetojn por du pilkoj. Se oni ne korektus tion, la rondeco de la du pilkoj estos malbonigita. Li tuj raportis la trovaĵon al la kontrolisto kaj evitigis la eraron. La partia organizo publike laŭdis majstron Hjue en la tuta fabriko pro lia zorgo pri la kvalito de produktaĵo. Majstro Hjue modeste diris: "Estas la partia organizo kiu instruis min tiel fari."

INSPIRO RICEVITA SUR PILKLUDEJO

La laboristoj kaj oficistoj de Liŝeng-fabriko aparte ŝatas rigardi pilkajn maĉojn. Ili prenas rigardadon de pilkaj maĉoj kiel rimedon por kontroli la kvaliton de pilkoj kaj pli bone progresigi sian laboron. En la lastaj jaroj, ili ofte ricevis inspirojn dum rigardado de diversaj pilkomaĉoj.

Foje, la gvidantoj de la fabriko sendis laboristojn kaj teknikistojn rigardi internacian amikan konkurson de piedpilko. Dum irado de la maĉo subite ekpluvis. Laŭ internacia kutimo, tia maĉo ne devas ĉesi pro vento aŭ pluvo. Sed pro tio ke la placo estis malseka kaj la pilko ensorbis akvon, malaltiĝis la resaltivo de la pilko kaj grandiĝis ĝia pezo. Kvankam oni ŝanĝis pilkon foje kaj refoje, tamen la sportistoj ne povis plene disvolvi sian teknikon. Tion vidante, la laboristoj kaj teknikistoj de Liŝeng tre maltrankviliĝis. Ili komencis diskuti pri la ebleco de produkto de kontarŭakva pilko.

Gvidantoj de la fabriko akceptis ilian proponon pri faro de tia pilko kaj tuj organizis grupon por prove tion fari. Por sukcesigi tion, oni nepre devas elfari kontraŭakvan ledon, kiu ne nur povas rezisti kontraŭ akvo en ĉia vetero kaj frapado, sed ankaŭ tenadi sian resaltivon kaj molecon. Per kia



Laboristoj, teknikistoj kaj kadroj kune konsiliĝas por altigi la kvaliton de produktaĵoj.

kontraŭakvaĵo oni povas priŝmiri ledon por fari tian idealan ledon?

Iu laboristo diris, ke la lako sur lakita elektra drato estas nepenetrebla de akvo. La grupo do vizitis fabrikon de lakita elektra drato por lerni sperton. Oni diris al ĝi, ke tia lako devas esti sekigita en temperaturo de pli ol 200° C. Sed ledoj ja ne povas elteni tian varmegon, do tia lako estas neaplikebla.

Poste, la grupanoj vizitis la Ledo-instituton kaj aliajn pli ol dek instituciojn por peti helpon kaj fine trovis taŭgan kontraŭakvaĵon. Teknikisto Ĉen kaj laboristoj de la grupo ŝmiris ĝin sur ledon, faris teknikan ekspertizon kaj konstatis, ke tia ledoj povas rezisti kontraŭ enpenetro de akvo, tamen pilko farita el ĝi ne havas bezonatan rezultivon. Ili do klopodis eltrovi la kaŭzon de tiu manko.

La grupanoj denove vizitis la Ledo-instituton kaj sub entuziasma helpo de ĝiaj laborantoj faris pliajn eksperimentojn pri diversaj akvorezistaĵoj. Post trimonata laboro, ili provis pli ol cent receptojn kaj elfaris kontraŭakvan ledon. Por provi ĝian taŭgecon, ĉiumatene ili pendigis ĝin eksterdome por ke ĝi spertu venton, pluvon kaj sunumon, kaj vespere ĝin prenis por fari kemian analizon en laboratorio kaj fizikan ekzamenon. Provado de pli ol unu jaro montras, ke en ĉia vetero tia ledoj ne ensorbas akvon nek kreviĝas, kaj ludate de sportistoj en pluvo pilko el tia ledoj montris sin kontentiga. Finfine la fabriko sukcesis elfari kontraŭakvan pilkon.

Nun, tiu fabriko jam povas produkti 110 specojn de pilkoj kaj ili estas tre bonvenigataj de enkaj eksterlandaj pilkoludantoj.



Al Matena Sun' Similas Amikeco Nia

de HINJEN

*Vjetnamio kaj Ĉinio
kun komunaj akvoj kaj montaroj
frontas al la sama maro,
al matena sun' similas amikeco nia.*

Dum la periodo de marto ĝis aprilo, 1973, la Amikeca Delegacio de Ho Chi Minh-a Labora Junulara Unio de Vjetnamio faris vizitadon en nia lando. La vizitado vivece enkorpiĝis la sinceran amikecon inter la ĉina kaj vjetnama popoloj similan al matena suno.

NI ESTAS SAMFAMILIANOJ

La 31-an de marto, la studentoj kaj instruistoj de pli ol 50 naciecoj en freŝkoloraj naciaj kostumoj

bonvenigis la karajn vjetnamajn kunbatalantojn ludante naciajn muzikaĵojn. Ĝing-nacieca studento Su Vejŝeng venis de Vanvej-insulo de Guanghi. Lia hejmloko kaj Mon Kaj de Vjetnamio estas apartigitaj nur de Bejang-rivero. Li diris kun rido al la vjetnamaj kunbatalantoj: "Ni prenas hejtaĵon de la sama monto kaj trinkas akvon el la sama rivero. Ni ja estas samfamilianoj!" Kaj la vjetnamaj kamaradoj ĝoje diris: "Ni estas interligitaj koro kun koro!"

Estrino de la delegacio Nguyen Thi Ngoc Khanh diris al la studentoj ke Vjetnamio, same kiel Ĉinio, estas lando kun multaj naciecoj. Sub la gvido de Prezidanto Ho Chi Minh kaj la Vjetnama Partio de Laboro, la diversnaciecaj popolanoj de norda Vjetnamio liberiĝis kaj ili aktive partoprenas en

Vjetnamaj gekamaradoj pririgardas la laboratorion de akvokonservado de Kinghua-universitato.





Dum la vizito de la delegacio al la Pekina Fabriko de Pezaj Elektraj Maŝinoj, ĝia estrino Nguyen Thi Ngoc Khanh donacas al la fabriko silkan flagon de Nguyen Ven Troi.

la konstruado de socialismo en la Nordo kaj subtenas la sudajn samlandanojn en batalo. Multaj el la nacimalplimultaj gejunuloj fariĝis herooj kaj modeloj en la batalado. Ankaŭ la diversnaciecaj gejunuloj de suda Vjetnamio aktive sin ĵetas en la nasisavan kontraŭuson militon, kuraĝigite de la granda instruo de Prezidanto Ho “**Nenio estas pli valora ol sendependeco kaj libereco**”. Multaj el ili fariĝis batalaj bravuloj kaj batalherooj. Aŭskultinte la prezenton de la estrino, la studentoj esprimis, ke ili nepre lernos la revolucionan spiriton de la diversnaciecaj popolanoj kaj gejunuloj de Vjetnamio kaj por ĉiam unuiĝos kun ili.

Tiutage, la vjetnamaj kunbatalantoj venis al la Pekina Metiarta Fabriko kaj rigardis la famajn klozoneaĵojn kaj diversajn elegantajn jadoskulptaĵojn. En intima atmosfero, laboristino Li Juekin diris al la vjetnamaj gastoj: “Prezidanto Maŭ diris, ke ‘**Ni ja estas samfamilianoj**’ kaj Prezidanto Ho diris, ke ni estas ‘**kaj kamaradoj kaj fratoj**’. Hodiaŭ je nia intervidiĝo kun vi, ni sentas kvazaŭ ni estus vidintaj niajn proprajn gefratojn.” La dele-

gacia estrino Nguyen Thi Ngoc Khanh diris: “Ni tre ĝojas, ke ni vidis vin ĉinajn gefratojn. La amikeco inter niaj popolanoj kaj gejunuloj estas tiel sincera kaj tiel bela kiel viaj jadoskulptaĵoj.”

MARŜI ŜULTRO ĈE ŜULTRO

La suno brilas super la tero, la kanalo Ruĝa Flago akvumas la verdan kamparon kaj persikaj kaj abrikotaj arboj floras tra la montodeklivo de Linhian-gubernio oriente de Tajhang-montaro. En tia hela printempa tago, la kanalo-konstruantoj bonvenigis kun ĝojo la vjetnamajn kunbatalantojn. En akompano de Vang Ŝicun, lerta boristo, Guo Kiuĵing, estrino de batala taĉmento de feraj knabinoj, kaj aliaj labor-herooj batalintaj sur konstruejo de la kanalo Ruĝa Flago, la vjetnamaj kunbatalantoj vizitis Duofeng-akvedukton, Kingnian-tunelon kaj aliajn grandajn akvoutiligajn konstruaĵojn. Dum la vizitado, batal-heroo Le Haj kaj labor-modelo Ho Thi Hien, membroj de la delegacio,

kune kun Vang Ŝicun kaj Guo Kiujing prezentis unu al alia siajn batalajn kolektivon kaj vivon.

En la granda nacisava kontraŭsona milito, kun sentima revolucia spirito Le Haj kaj aliaj pilotoj donis al la malamiko pezan baton. Le Haj sola faligis unu post alia ses malamikajn aviadilojn. Prezidanto Ho Chi Minh siatempe pendigis pramane heroan medalon sur lian bruston. Por subteni la fronton, Ho Thi Thu Hien kune kun siaj kunbatalantinoj konstruis pontojn kaj elhakis vojojn, spite de freneza bombado de malamikaj aviadiloj, por faciligi la transportadon de municioj al la fronto kaj de vunditoj al la postfronto. Ili ricevis laŭdojn kaj premiojn de la superuloj pro ilia persista batalado dum pluraj jaroj.

La heroaĵoj de Le Haj kaj Ho Thi Thu Hien multe kortuŝis Vang Ŝicun kaj Guo Kiujing. Vang Ŝicun diris: "Vi ja estas veraj herooj. La vjetnamaj popolo kaj gejunuloj estas lernindaj ekzemploj por ni." Kaj Le Haj diris: "Tre kortuŝa estas la konstruado de via kanalo Ruĝa Flago. Via spirito de penema luktado en malfaciloj kaj sinapogo sur la propraj fortoj estas lerninda por ni. Ni devas lerni unuj de aliaj kaj marŝi ŝultro ĉe ŝultro."

RECIPROKA KURAĜIGO

La membroj de la Komunisma Junulara Ligo kaj aliaj junuloj de la Ŝanhaja Kaldronega Fabriko rigardis la viziton de la vjetnamaj kunbatalantoj al sia fabriko kiel bonan ŝancon por lerni de ili. En la 3-a de aprilo, tamtamante kaj tamburante ili bonvenigis en vicoj la vjetnamajn kunbatalantojn ĉe la fabriko pordo. La gejunuloj de Ĉinio kaj Vjetnamio senĝene interbabilis pri amikeco. Juna forĝistino Hju Hongjing diris al la vjetnamaj gastoj, ke ŝi kaj aliaj kelkaj junaj forĝistinoj renkontis multajn malfacilojn ĉe la komenco de sia okupo, tamen ili relative bone plenumis la taskon sub la edukado de la Partio kaj la Komunisma Junulara Ligo. Tiam, iu maljuna laboristo kiu iam vizitis Vjetnamion rakontis al ili pri la heroaĵoj de la vjetnamaj gejunuloj precipe junulinoj en la nacisava kontraŭsona milito, kaj tio multe kuraĝigis ilin. Tiam Ho Thi Thu Hien varme manpremis kun Hju Hongjing por esprimi gratulon. La estrino de la delegacio Nguyen Thi Ngoc Khanh ankaŭ rakontis al ili, kiel Ho Thi Thu Hien gvidis sian junulan taĉmenton al batalo, kaj tio kortuŝis ĉiujn. La kuna batalado kaj intima interparolado strikte kunligis la dulandajn gejunulojn. Ĉe la

adiaŭo, vicedestro de la delegacio Bui Huu Tri donacis al la Komunisma Junulara Ligo de la fabriko la standardon de Ho Chi Minh-a Labora Junulara Unio de Vjetnamio kaj bildgazetojn pri heroaĵoj de la vjetnama popolo. Kian Hingbaŭ, sekretario de la komitato de la Komunisma Junulara Ligo de la fabriko, akceptis tiujn karajn donacojn kaj diris manprenante kun Bui Huu Tri: "Ni nepre prenos la vjetnamajn gejunulojn kiel nian lernendan ekzemplon. Ni deziras ke eterne daŭru la batala amikeco inter la gejunuloj kaj popoloj de Ĉinio kaj Vjetnamio!"

"NI VENIS AL LA HEJMLOKO DE ONKLO MAŬ"

En la 11-a de aprilo, la delegacio venis al Ŝaŭŝan ĉirkaŭata de verda pinaro. Ĝiaj membroj ĝoje diris: "Ni venis al la hejmloko de onklo Maŭ." Labormodelo Ho Thi Thu Hien diris: "Mi estas aparte emociita, ĉar mi venas al la hejmloko de onklo Maŭ de la provinco Nghe An, la hejmloko de Prezidanto Ho!" Tie, la vjetnamaj kunbatalantoj vizitis la antaŭan loĝejon de Prezidanto Maŭ kaj ĝian ekspozicion kaj sin fotigis antaŭ la loĝejo kune kun ĉinaj kamaradoj. Ŝaŭŝan-aj popolanoj kaj gejunuloj varme bonvenigis kaj regalis la vjetnamajn gejunulojn per fruktoj kaj legomoj mem produktitaj. Li Hiulan kaj Jan Jongjan, reprezentantoj de la junularo de Ŝaŭŝan raportis al ili, kiel la Ŝaŭŝan-aj gejunuloj aktive partoprenas en revolucio kaj produkta batalado. Ili diris, ke la Ŝaŭŝan-aj organizoj de la Partio kaj Junulara Ligo ofte faris al gejunuloj kaj geknaboj edukadon pri la revolucia tradicio kaj proletara internaciismo. Tio kuraĝigis la Ŝaŭŝan-ajn gejunulojn kaj geknabojn ludi aktivan rolon en revolucio kaj produktado. Pasintjare, ili pene laboris kune kun la komunumanoj de la tuta distrikto kaj akiris bonan rikolton malgraŭ trosekeco. Nun, la tutdistrikta komunumanoj kaj gejunuloj klopodas por akiri ankoraŭ pli bonan rikolton por subteni la socialisman konstruadon de la patrolando kaj la revolucionan batalon de la popoloj de Vjetnamio kaj aliaj landoj de la mondo. Tio multe ĝojigis la vjetnamajn kunbatalantojn. La delegacia estrino Nguyen Thi Ngoc Khanh diris: "La floro de amikeco inter la dulandaj popoloj kaj gejunuloj de Vjetnamio kaj Ĉinio persone kulturita de Prezidanto Ho kaj Prezidanto Maŭ estas pli bela ol montaj floroj. La montaj floroj floras mallonge dum nia floro de amikeco neniam velkiĝos!"



Vjetnamaj kunbatalantoj vizitas la Pekinan Metiartan Fabrikon.

REVOLUCIA AMIKECO DAŬROS DE GENERACIO AL GENERACIO

Atinginte Kantonon, la delegacio tuj vizitis kun emocio la lokon kie Prezidanto Ho Chi Minh siatempe faris revolucionan aktivadon en Kantono. De la jaro 1925 ĝis 1927, Prezidanto Ho starigis tie Asocion de Junaj Vjetnamaj Revoluciuloj, kiu fariĝis poste la Vjetnama Partio de Laboro, kaj politikan kurson por vjetnamaj gejunuloj, kaj eldonis semajnan revuon *Juneco*. Tiam multaj vjetnamaj gejunuloj sekrete venis al Kantono por partopreni en la kurso kaj studi revolucionan teorion.

La vjetnamaj kunbatalantoj sentis grandan gloron pro tio ke ilia organizo portas la nomon de la granda gvidanto Prezidanto Ho Chi Minh kaj senkomparan feliĉon pro sia pilgrimo al la loko kie Prezidanto Ho siatempe faris revolucionan aktivadon. Ili sin fotigis kune kun la akompanantaj ĉinaj kamaradoj antaŭ la portreto de Prezidanto Ho.

Ekde la dudekaj jaroj de la kuranta jarcento, la ĉinaj kaj vjetnamaj revoluciuloj jam batalis ŝultro ĉe ŝultro. Prezidanto Ho Chi Minh plurfoje venis al Kantono, Gulin kaj Kunming. Ankaŭ nemalmultaj vjetnamaj gejunuloj venis al Ĉinio por entrepreni revolucionan aktivadon. La ĉinaj kaj vjetnamaj revoluciuloj subtenis unu la alian. La veteranaj formis revolucionan amikecon per sia sango kio ĝis nun inspiras la dulandajn junulojn kaj popolojn. La ĉinaj akompanantoj diris: "Prezidanto Ho por ĉiam vivos en nia koro." La delegacia estrino Nguyen Thi Ngoc Khanh diris: "La vjetnamaj gejunuloj edukitaj de la Vjetnama Partio de Laboro kaj Prezidanto Ho decidis daŭrigi la aferon de la Partio, pli bone firmigi kaj disvolvi la batalan unuiĝon kaj revolucionan amikecon inter la vjetnamaj kaj ĉinaj popoloj kaj gejunuloj por ke tiu unuiĝo kaj amikeco daŭru de generacio al generacio!"

Kultura kaj Amikeca Aktivado



RUMANA-ĈINA AMIKECA ASOCIO ESTABLITA

La Rumana-Ĉina Amikeca Asocio estis establita en Bukareŝto je la 17-a de aprilo, 1973.

La prezidanto de la asocio estas Chivu Stoica, prezidanto de la Centra Kontrolo Komisiono de la Rumana Komunista Partio kaj deputito al la Granda Nacia Asembleo. La vicprezidantoj de la asocio estas Stefan Pavel, membro de CK de RKP kaj membro de la Sekretariejo de la Centra Konsilantaro de la Ĝenerala Sindikata Konfederacio, Dumitru Joita, alterna membro de CK de RKP kaj prezidanto de la Administra Komitato de la Urba Popola Konsilantaro de Bukareŝto, Stefan Pascu, alterna membro de CK de RKP kaj rektoro de Cluj-universitato, kaj Eugen Barbu, alterna membro de CK de RKP kaj verkisto.

Inaŭgura kunveno de la asocio estis aranĝita de la Rumana Instituto por Kulturaj Rilatoj kun Eksteraj Landoj. A. Vela, alterna membro de CK de RKP kaj vicprezidanto de la Instituto por Kulturaj Rilatoj kun Eksteraj Landoj, la unua faris paroladon en la kunveno. Li diris ke la establiĝo de la Rumana-Ĉina Amikeca Asocio “elokvente manifestis la sentojn de reciprokaj respekto kaj amo inter la popoloj de Rumanio kaj Ĉinio, kaj ankaŭ la amikecon kaj internaciisman unuiĝon inter niaj du partioj kaj du landoj”.

En sia parolado, Chivu Stoica, prezidanto de la Rumana-Ĉina Amikeca Asocio, diris, ke la Rumana-Ĉina Amikeca Asocio “faros siajn kontribuojn al la disvolvo de la tradiciaj rilatoj inter la popoloj de la du landoj, pli bona reciproka kompreno de la sukcesoj de la du popoloj akiritaj en la socialisma konstruado sub la gvido de siaj partioj, kaj akcelo de amikeco kaj frateco, kaj sentoj de reciprokaj respekto kaj konfido”.


Ĝang Hajfeng, ĉina ambasadoro al Rumanio, ĉeestis la kunvenon laŭ invito kaj faris ankaŭ paroladon en ĝi. Li varme akklamis la establiĝon de la Rumana-Ĉina Amikeca Asocio kaj montris ke tio estis alia ĝojiga afero en la historio de la amikecaj rilatoj inter la popoloj de la du landoj.

EKSPOZICIO DE LA TRADICIAJ ARTO KAJ KULTURO DE MEKSIKIO MALFERMITA EN ĈINIO

Je la 21-a de aprilo malfermiĝis en Pekino la Ekspozicio de la Tradiciaj Arto kaj Kulturo de Meksikio, la unua ekspozicio okazigita en Ĉinio post la establiĝo de la diplomaciaj rilatoj inter Ĉinio kaj Meksikio.

La meksikia prezidanto Luis Echeverria Alvarez, s-ino Echeverria kaj aliaj honorindaj meksikaj gastoj ĉeestis la malferman ceremonion. La ceremonion ĉeestis ĉinaj Ĝoŭ Enlaj, ĉefministro de la Ŝtata Konsilantaro, Guo Moĵuo, vicprezidanto de la Konstanta Komitato de la Tutlanda Popola Kongreso, respondeculoj de koncernaj departementoj kaj pli ol 500 loĝantoj de Pekino.

Gi Pengfej, ĉina ministro de eksterlandaj aferoj, kaj Emilio O. Rabasa, meksikia sekretario de eksterlandaj aferoj, faris paroladon sinsekve dum la malferma ceremonio. Ministro Gi Pengfej diris, ke la verkoj de arto kaj kulturo de Meksikio ĉifoje elmontritaj estis de alta arta valoro, kaj vivece respugulis la evolucion de la meksikia kulturo. La ekspozicio multe helpis nin profundigi komprenon pri Meksikio kaj provizis nin per tre bona ŝanco lerni de la meksikia popolo. Li laŭdis la ekspozicion kiel kontentigan novan disvolviĝon en kulturaj interŝanĝoj inter Ĉinio kaj Meksikio.



Sekretario Emilio O. Rabasa diris: “Kun aparta kontento ni prezentas al la ĉina popolo, per la figuraĵoj de niaj pasinteco kaj estanteco, ateston pri la aspiroj kaj atingoj de Meksikio.”

Ĉefministro Ĝoŭ Enlaj tondis la rubandon por la ekspozicio. Akompanate de Prezidanto Echeverria kaj lia edzino, Ĉefministro Ĝoŭ Enlaj kaj Vicprezidanto Guo Moĵuo k.a. rigardis la ekspozitaĵojn.

La ekspozicio estis kune aranĝita de la Ĉina Popola Asocio por Amikeco kun Fremdaj Landoj kaj la ambasadorejo de Meksikio en Ĉinio. Post elmontraro en Pekino, la ekspozitaĵoj estis montritaj ankaŭ en Ĝengĝoŭ, Nankino kaj Ŝanhajo, kaj trovis varman aprobon ĉe la ĉinaj vizitantoj.

JAPANA SUMO-LUKTA TRUPO EN ĈINIO

Invitite de la Tut-ĉinia Sporta Federacio, la Japana *Sumo*-lukta Trupo kun 117 membroj venis al Ĉinio en aprilo de 1973, por amikeca vizitado. En Pekino kaj Ŝanhajo, ili faris *sumo*-luktadon kaj ricevis varman akcepton ĉe la ĉinaj rigardantoj.

En Pekino, Ĝoŭ Enlaj, ĉefministro de la Ŝtata Konsilantaro, Je Gianjing, vicprezidanto de la Milita Komisiono, Guo Moĵuo, vicprezidanto de la Konstanta Komitato de la Tutlanda Popola Kongreso kaj honora prezidanto de la Ĉina-Japana Amikeca Asocio, Liaŭ Ĉengĝi, prezidanto de la Ĉina-Japana Amikeca Asocio k.a. rigardis la prezentadon de la japanaj *sumo*-luktantoj. Antaŭ la prezentado, Ĉefministro Ĝoŭ Enlaj kaj Vicprezidanto Je Gianjing k.a. intervidiĝis kun gvidanto de la Japana *Sumo*-lukta Trupo Joŝihide Musaŝikava, vicgvidantoj kaj aliaj japanaj amikoj, kaj fotiĝis kune kun la japanaj *sumo*-luktantoj.

En sia akcepto-bankedo la gvidanto de la Japana *Sumo*-lukta Trupo diris: “La varma bonvenigo kiun ni ricevis de la ĉina popolo ĉie en Pekino profunde komprenigis nin, ke la ĉina popolo estas la plej bona amiko por la japana popolo.” Ĝaŭ Ĝenghong, respondeculo de la Tut-ĉinia Sporta Federacio, diris ke la amikeco inter la ĉina kaj japana popoloj kreskos tago post tago, ĝuste kiel vicprezidanto Guo Moĵuo skribis al la Japana *Sumo*-lukta Trupo: “La akvo de l’ Flava Rivero fluas al Edogava, kaj monto Ĝomolangma kuniĝas kun Fujijama.”

La Viena Filharmonia Orkestro kaj ĉinaj muzikistoj kune ludas la fortepianan koncerton "La Flava Rivero".



VIENA FILHARMONIA ORKESTRO EN PEKINO

Pekino akceptis de la 11-a ĝis la 14-a de aprilo, 1973, gastojn venintajn de la bordo de Danubo — la Vienan Filharmonian Orkestron de Aŭstrio.

La orkestro veninta de Vieno, la fama muzika urbo de Eŭropo, havas longan tradicion kaj tre profundan instruitecon. Tre ĝojaj estis la ĉinaj aŭskultantoj ke ili la unuan fojon aŭskultis vienajn klasikajn muzikaĵojn kaj aliajn simfoniojn de germanaj kaj aŭstraj komponistoj luditajn de la aŭstraj amikoj. Iliaj serioza stilo, riĉaj esprimo-manieroj kaj lerta ludarto rikoltis varmajn aplaŭdojn ĉe la aŭskultantoj.

La tuta vizitado de la muzikistoj de la orkestro en Pekino vivece enkorpigis la amikecon inter la ĉina kaj aŭstra popoloj. Ili sukcese ludis kune kun ĉinaj muzikistoj la fortepianan koncerton *La Flava Rivero*, kiu simbolas la malcedeman batalan spiriton de la ĉina nacio. Veterana majstro de muzikiloj de la orkestro varme prezentis sian sperton pri fabrikado de muzikaj instrumentoj dum sia vizito al la Pekina Muzikila Fabriko.

Antaŭ la forlaso de Pekino, Prof. Wilhelm Huebner, prezidanto de la orkestro, diris varme: "Ni venis al vi kaj akiris amikojn per muziko kiu servas kiel ponto. Ni esperas ke nia disiĝo fariĝos

bona komenco de nia amikeco kaj artaj interŝanĝoj en la estonteco."

DANA GIMNASTIKA TEAMO EN ĈINIO

Laŭ la invito de la Ĉina Gimnastika Federacio, la Dana Gimnastika Teamo faris amikan vizitadon al Ĉinio de la 22-a de marto ĝis la 9-a de aprilo.

En la bonveniga ceremonio en la Ĉefurba Sporta Halo, Erik Flensted-Jensen, estro de la teamo, prezentis al 18,000 ĉinaj spektantoj sian teamon. Li diris: "Ni estas tre ĝojaj viziti Ĉinion. Tio estas utila al la disvolvo de la amikecaj rilatoj inter niaj du landoj. Nun, la Ĉina Gimnastika Teamo vizitas Danujon, kaj kun la sama sento, ni bonvenigas la ĉinan teamon."

Dum sia vizitado al Pekino, Tiangin, Ŝanhajo kaj Kantono, la Dana Gimnastika Teamo faris prezentadon. La danaj gesportistoj prezentis diversajn ekzercojn de la dana moderna gimnastiko kaj ankaŭ danajn popolajn dancojn por la ĉinaj spektantoj. Ilia kolorriĉa kaj eleganta prezentado trovis varman bonvenigon kaj aplaŭdon ĉe la ĉinaj rigardantoj.

La vizitado de la Dana Gimnastika Teamo plupaŝe pliigis la interkomprenon kaj amikecon inter la ĉinaj kaj danaj popoloj kaj sportistoj.

Japana Sumo-lukta Trupo en Ĉinio



Ĝaŭ Ĝenghong, respondeculo de la Tut-ĉinia Sporta Federacio, donacas al Joŝihide Musaŝikava, gvidanto de la Japana Sumo-lukta Trupo, la surskribon de Guo Muojio, vicprezidanto de la Konstanta Komitato de la Tutlanda Popola Kongreso.



Vizito en la Malnova Palaco

Malsupre maldekstre: Kune kun ĉinaj infanoj

Vizito en Ŝanhajo



Sumo-luktado en la Pekina Laborista Sporta Halo


Dana Gimnastika Teamo en Ĉinio

Pilko-gimnastiko





Kune sin amuzas ĉinaj kaj danaj gimnastoj.





Dana popola danco



La danaj gimnastoj antaŭ Tian-anmen-pordego

Nova Fizionomia de la Monda Tablotenisa Sporto


LA 32-a Monda Tablotenisa Ĉampionea Turniro okazis en Sarajevo de Jugoslavio. Ĝin partoprenis pli ol 400 sportistoj kaj centoj da sportaj laborantoj venintaj de pli ol 60 landoj kaj regionoj. Tiu ĉampionea turniro estis senprecedenca evento por la mondaj tablotenisistoj en pliigo de amikeco, reciproka lernado kaj altigo de ludarto.

PLIIGO DE AMIKECO

“Mi venas al tiu ĉi monda turniro por lernado kaj amikiĝo, kvankam mi eble venkos neniun.” La vortoj de Raymond Begina, tablotenisisto de Curacao-insulo de Latinameriko, respegulis la fortan deziron de diverslandaj sportistoj pri amikeco.

Antaŭvespere de la malfermo de la turniro, informiĝinte ke C. Crisan, la parulino de rumana sportistino Maria Alexandru en la virina duopo, ankoraŭ ne venis al Jugoslavio, japana tablotenisistino Miho Hamada tuj pariĝis kun Alexandru. Kvankam ili ne komprenis unu alies lingvon nek kunlaboris en virina duopo en la pasinteco, tamen ili ĉiam prizorgis kaj helpis unu la alian. Per la akorda kunlaboro ili gajnis la ĉampionecon de virina duopo. Iliaj amikeco kaj kunlaboro estis admire preparolataj dum la turniro.

La ĉinaj kaj usonaj tablotenisistoj loĝis en la sama hotelo. Je la unua renkontiĝo ili tuj rememoris la reciprokajn vizitojn kaj kune sin ekzercadis. La nova kunvivado pliprofundigis ilian amikecon.



Ĉina kaj irana sportistoj kune sin ekzercas.



Ĉinaj tablotenisistoj vizitas japanajn sportistojn en ilia hotelo.

Dum la konkursado la juĝistoj konsiliĝis kun la koncernaj teamoj ĉiam en amika kunlaboremo. La sportistoj kaj juĝistoj respektis unu alian. Je hazarda erara juĝo la poent-gajnanto ofte montris ke la poento devas esti donita al la rivalo. Tiu amika harmonio inter la sportistoj ricevis laŭdojn de la vasta rigardantaro. La rivaloj ĉiam varme manpremis kaj salutis unu la alian, malgraŭ venko aŭ malvenko. Kiam la sveda teamo venkis la ĉinan teamon en la vira teama konkurso, Ĉen Hian, vicestro de la Ĉina Tablotenisa Delegacio, tuj esprimis varman gratulon al la svedaj tablotenisistoj. Kiam ĉina sportisto Hi Enting venkis svedan sportiston Kjell Johansson en la finalo de la vira unuopa konkurso, la sveda teamestro Christer Johansson, pli aĝa frato de la lasta, kuris la unua al Hi Enting por lin brakumi. La ĉina sportisto Ĝang Hielin, kiu plurfoje partoprenis en mondaj tablotenisaj turniroj, diris: "La turniro estas tiel inspira, ke oni pretervole aplaŭdas al la spirito 'unue amikeco'."

KUNA ALTIGO DE LUDARTO

La konkurso montris, ke en la pasintaj du jaroj post la 1971-jara turniro, la nivelo de diverslandaj tablotenisistoj estas ĝenerale altigita kaj la distanco de ludarto inter ili estas mallongigita.

La rimarkinda kresko de la forto de la eŭropaj viraj sportistoj estas okulfrapa karakterizaĵo de tiu ĉi turniro. La svedaj sportistoj gajnis por Eŭropo la mondan ĉampionecon de vira teama konkurso, kiun la aziaj sportistoj konservis jam 20 jarojn. Ili gajnis ankaŭ la ĉampionecon de vira duopo kaj la subĉampionecon de vira unuopo. La kvaron-finalon de la vira unuopa konkurso eniris du tablotenisistoj de Jugoslavio kaj po unu de Svedio, Ĉeĥoslovakio, Francio, Hungario, Sovetunio kaj Ĉinio. Tio montris, ke sportistoj de tiom multaj landoj jam atingis la nivelon por gajni tiun ĉampionecon. Ankaŭ la eŭropaj sportistinoj gajnis pli bonajn sukcesojn ol antaŭ du jaroj.

Komentariante tiun turniron, H. Roy Evans, prezidanto de la Internacia Tablotenisa Federacio, diris: "En la pasinteco, troviĝis certa distanco de la tablotenisa nivelo inter Eŭropo kaj Azio. Nun malaperis tiu distanco. En la pasinteco, nur Ĉinio kaj Japanio posedis eblecon por gajni ĉampionecon, dum nun tian eblecon havas pli multaj sportistoj." Li daŭrigis: "Tio, ke la diversaj ĉampionejoj de la monda tablotenisa turniro estas gajnitaj respektive de sportistoj de pli multaj landoj, multe utilas al la disvolviĝo de tablotenisa sporto tra la tuta mondo."

EMINENTAJ JUNAJ SPORTISTOJ

Alia okulfrapa karakterizaĵo en tiu ĉampionea turniro estis la nova forto de monda tablotenisa sporto en kreskado.

En la 31-a Monda Tablotenisa Ĉampionea Turniro de 1971, 22-jara Stellan Bengtsson de Svedio fariĝis la unua eŭropa sportisto, kiu gajnis la ĉampionecon de vira unuopo depost la jaro 1953. En la 32-a Monda Tablotenisa Ĉampionea Turniro, li ludis ĉefan rolon por la sveda teamo en ĝia gajno de la ĉampionecon de vira teama konkurso. La meznombra aĝo de ĉiuj membroj de la japana teamo estis malpli ol 23-jara. Ĝiaj 21-jaraj Norio Takaŝima kaj Saĉiko Jokota jam fariĝis ĉefaj membroj. Alia japana sportisto Masajuki Kuse estas nur 18-jara, li tamen venkis ĉinan sportiston Ju Jize per 3:1. Hungaraj sportistoj Istvan Jonyer kaj Tibor Klampar, kiuj gajnis la mondan ĉampionecon de vira duopo en 1971 kaj subĉampionecon de tiu konkurso en la nuna turniro, estas respektive 22-jara kaj 20-jara. La ĉina 22-jara sportistino Ĝang Li venkis nemalmultajn fortajn sportistinojn kaj gajnis la trian lokon en virina unuopa konkurso. La 15-jara ĉeĥoslovaka sportistino Hana Ridlova venkis ĉinan sportistinon Li Li, la duan

semon de virina unuopo. Tiuj junaj gesportistoj aldonis al la turniro novan forton.

Ankaŭ en la disvolvigantaj landoj kaj regionoj de Azio, Afriko kaj Latinameriko, la tablotenisa sporto progresas senĉese kaj la ludarta nivelo altiĝas paŝon post paŝo. Dum la turniro, la Internacia Tablotenisa Federacio okazigis sian kunsidon de konsilantoj, kiu decidis akcepti tablotenisajn asociojn de 7 aziaj kaj afrikaj landoj kiel siajn membrojn. Sportistoj de Cipro kaj Liberio k. a. aziaj kaj afrikaj landoj unuafoje partoprenis en la monda tablotenisa turniro. Ĉifoje ankaŭ la ludarta nivelo de iuj aziaj kaj afrikaj sportistoj pli altiĝis ol en 1971. La tablotenisa vira teamo de Malajzio gajnis la 25-an lokon de la vira teama konkurso en la 1971-jara turniro dum nun la 18-an lokon. B. Obisanya de Nigerio gajnis seton super Hi Enting de Ĉinio en maĉo de vira unuopo. Ĉio ĉi tio estas ĝojiga fenomeno.

RECIPROKA LERNADO

Kun la spirito "unue amikeco, due konkurso", la ĉinaj sportistoj partoprenis en tiu ĉi ĉampionea turniro. Ili modeste lernis de la diverslandaj tablotenisistoj bonan stilon kaj teknikon, ĝojis pro



Ĉinaj kaj usonaj sportistinoj en la sportejoj



Ĉinaj kaj jugoslavaj sportistoj en amika renkontiĝo

progreso de malnovaj amikoj en tekniko kaj inspiriĝis pro la kresko de novicoj.

Hju Jinŝeng, vicestro kaj ĝenerala trejnisto de la ĉina delegacio, diris: “En la lastaj jaroj rimarkeinde altiĝis la teknika nivelo de diverslandaj tablotenisistoj. Longe en la pasinteco, aziaj sportistoj superis la defensivan ludon de eŭropaj sportistoj per ofensiva. Japanaj sportistoj kreis novan atakan teknikon de supren-turna frapo kaj per tio akcelis la disvolviĝon de tablotenisa tekniko. En la lastaj jaroj eŭropaj sportistoj tamen asimilis avantaĝon de azia ludarto kaj, bone kombininte rapidan atakon kaj supren-turnan frapon laŭ sia kutimo kaj kondiĉoj, formis sian apartan ludarton. Ilia spirito lerni de aliaj por riĉigi sian ludarton estas lerninda por ni ĉinaj sportistoj.” Ĉina sportistino Hu Julan diris: “En tiu ĉi turniro mi lernis multon de diverslandaj sportistoj. La veteranoj, aplombaj kaj spertaj, posedas kompletan teknikon, la novicoj, kuraĝaj kaj obstinaj, estas sentimaj al fortuloj, ili ĉiuj estas por mi lernindaj.”

Dum la ĉampionecca turniro, la Sarajev-anoj akceptis la Ĉinan Tablotenisan Delegacion per siaj aparte gastamaj sinteno kaj ago, kaj ĉie manifestiĝis la profunda amikeco inter la popoloj de ambaŭ landoj. Dank’ al vasta kontaktiĝo kun diverslandaj geamikoj, la ĉinaj sportistoj ne nur plifortigis la amikecon kun la malnovaj amikoj, sed ankaŭ amikiĝis kun multaj aliaj. Pli da intemeco la fame konata japana veterana tablotenisistino Kimiĵo Kurimoto (Macuzaki) sentis, kiam ŝi renkontiĝis kun la ĉinaj geamikoj. Kiam Li Fuĵong k. a. invitis ŝin refoje al Ĉinio, ŝi diris ĝoje: “Tion mi tre deziras kaj mi nepre iros, se estos por mi ŝanco.” A. A. Efunkoya, prezidanto de la Nigeria Tablotenisa Asocio, esperis, ke la tablotenisistoj de Azio, Afriko kaj Latinameriko povos refoje renkontiĝi en Pekino. Li diris: “Mi esperas ke pli multaj landoj de Afriko povos partopreni en la Tablotenisa Invita Amikeca Turniro de Afriko kaj Latinameriko.” Latinamerika tablotenisisto R. Begina fariĝis nova amiko de la ĉinaj sportistoj. Kiam li informiĝis, ke la invita turniro okazos ĉiaŭtune en Pekino, li diris: “Mi nepre veturos al Pekino.”



Ĉinaj Naciecoj

MJAŬ-NACIO

de ZONGMIN

MJAU-NACIO kun 2,700,000 anoj plejparte loĝas en Mjaŭling-montaro en la suda parto de Gujĝoŭ kaj Vuling-montaro en la okcidenta parto de Hunan kaj la restanta parto estas en Junnan, Guanghi, Siĉuan kaj Hajnan-insulo de Guangdong.

En Juan- kaj Ming-dinastioj la mjaŭ-nacia socio troviĝis ankoraŭ en la stadio de feŭdmastra posed-sistemo, en kiu la vastaj amasoj de mjaŭ-aj popolanoj estis servutuloj de la feŭdaj mastroj. Meze de Ming- kaj King-dinastioj, la feŭda bienula ekonomio anstataŭis la feŭdan servutan ekonomion sekve de ekonomia disvolviĝo. Sub la ekspluatado kaj subpremado de la regantaro de diversaj historiaj periodoj la mjaŭ-aj popolanoj vivis tre mizere, kaj poste dronis en pli malfacilega stato pro agresado de imperiismo kaj kruela turmentado de la reacia kuomintang-a registaro per nacieca diskriminacio kaj pezaj impostoj.

Kie estas subpremo tie estas kontraŭstaro. De multaj jarcentoj la mjaŭ-a popolo senĉese batalis kontraŭ la reaciaj regantoj. Ĝia historio plenas je klasaj bataloj kontraŭ la feŭdaj bienuloj kaj subpremado kaj agresado de imperiismo.

Post la naskiĝo de la Komunista Partio de Ĉinio la batalo de la mjaŭ-a popolo unuiĝis kun la revolucia torentego sub la gvido de la Partio kontraŭ feŭdismo kaj imperiismo. Jam frue en decembro de la jaro 1926, la Unua Hunan-provinca Kunveno de Kamparanaj Reprezentantoj kunvokita de la Partio en Ĉangŝa jam faris rezolucion pri mobilizado de la mjaŭoj al revoluciado por ke ili liberiĝu el sub la reacia regado de imperiismo kaj feŭdismo. En la jaro 1935 la Ĉina Laborista-Kamparana Ruĝa Armeo ekbruligis revoluciajn fajrerojn en regionoj de mjaŭoj, kiam ĝi trapasis ilin en sia Longa Marŝo. Nemalmultaj junuloj aniĝis al la Ruĝa Armeo kaj marŝis norden por batali kontraŭ la japanaj agresantoj. Dum la periodo de la Liberiga Milito la mjaŭ-aj popolanoj vigle disvolvis gerilan militon en siaj vastaj hejmlokoj kaj per tio donis fortan baton al la reacia regado de Kuomintango, kaj fine gajnis liberiĝon en 1949.

Delonge mjaŭ-nacio famas pro sia laboremo kaj braveco kaj en antikveco ĝi jam havis evoluintajn agrikulturon kaj metian industrion. Ĉ. la jaro 1,002 p. K., la tiama Song-dinastia registaro jam interŝanĝis grenon de mjaŭoj kontraŭ salo, kio klare montras, ke tiam ĝia agrikulturo jam havis bonan disvolviĝon. Rilate ĝian ŝpinteksan arton ĝia teksaĵo "Gebu" produktita en Tang-dinastio kaj ĝia "Hibu" produktita en Song-dinastio ĝuis grandan famon pro la bonkvaliteco kaj delikateco. Ankoraŭ en la tempo de Tang-dinastio mjaŭ-aj popolanoj jam scipovis tinkturi katunon kun blankaj desegnoj laŭ jena procedo: unue fari sur ŝtofo desegnaĵojn de floroj, birdoj, insektoj kaj fiŝoj per

Long Mejgin (la unua de maldekstre), studentino de la Centra Instituto de Nacimalplimultoj de Pekino, kaj ŝiaj koleginoj



vakso kaj bluigi ĝin; due forigi la vakson per kuirado de la ŝtofo. Tia tekniko poste disvolviĝis en fame konatan metiarton de mjaŭ-nacio.

Mjaŭ-nacio ne havis sian skriban lingvon, tamen ĝia buŝa literaturo estas tre riĉa kaj cirkulas granda kvanto da legendoj, rakontoj kaj kantoj. La mjaŭoj ŝatas kaj scipovas kanti. Ili havas siajn perkutajn kaj blovajn muzikilojn. La mjaŭoj ankaŭ ŝatas danci en akompanado de kupraj kaj lignaj tamburoj. El la blovaj muzikiloj la plej ofte uzata estas *luŝeng*, speco de buŝharmoniko el bambuaj tubetoj provizitaj per anĉoj. Krome troviĝas ĉe ili ankaŭ *surnao*, bambua fluto, bambua flaĝoleto kaj aliaj. La mjaŭoj en sudorienta Gujĝoŭ tre ŝatas ludi *luŝeng*, per kiu oni povas produkti melodiojn viglajn kaj fortajn.

La mjaŭoj lertas ankaŭ en dancado. Ĉu tamburdanco de la gubernioj Fenghuang kaj Guĝang aŭ solpersona kaj dupersona tamburdancoj en Baŭging kaj Huajuan de la provinco Hunan, ĉiuj estas kreitaj de mjaŭoj. Kaj la mjaŭoj en Gujĝoŭ, Junnan, Siĉuan kaj Guanghi tre ŝatas danci kun akom-

pana muziko de *luŝeng*, tial oni nomas la dancon *luŝeng*-danco, pri kiu troviĝis notoj jam en la literaturo de Song-dinastio.

La montregionoj loĝataj de mjaŭoj havas mildan klimaton kaj multajn grandajn arbarojn. Ili estas riĉaj je produktaĵoj. Post la Liberiĝo, laŭ la lokaj naturaj kondiĉoj la mjaŭ-aj popolanoj, krom energia reformado de la naturo por disvolvi agrikulturan produkton, ankaŭ energie disvolvis forstkulturadon, minekspluatadon kaj produktadon de lokaj produktaĵoj. En la jaro 1972, pli ol sepdek mil mjaŭoj kiuj loĝas ĉe Damiaŭŝan-montaro en Guanghi forstigis 56,667 hektarojn en 26 tagoj kaj verdigis kalvajn montojn kun longeco de 250 kilometroj. Sole en 1971 Sangĝi-gubernio en la okcidenta parto de Hunan plantis en amasa movado pli ol 260 specojn de ĉinaj drogoj inkluzive de koptiso, tianma-o (*Gastrodia elata*) kaj tangŝen-o (*Codonopsis tangshen oliv*), kaj rikoltis tiujare 305,000 kilogramojn da diversaj drogoj. Post la Liberiĝo la mjaŭ-nacia regiono komencis starigi kaj rapide disvolvis sian industrion sub la gvido de la Partio. Ni prenu la Hianghi-an Mjaŭ-an Aŭtonoman Sub-

Vang Suĝen (mjaŭo, la unua de dekstre), sekretario de la partia filio de Taŝanbrigado de Kijang-komunumo, Gujĝoŭ-provinco, interparolas kun komunumanoj.




provincon kiel ekzemplon. Antaŭ la Liberiĝo ĝi havis nenian industrion. Sed en 1972 ĝi jam posedis 260 fabrikojn kaj minejojn en prospero, kiuj elkulturis jam multajn mjaŭ-ajn laboristojn.

Kun disvolviĝo de la socialisma revolucio kaj socialisma konstruado ankaŭ la kulturo, eduko kaj higiena afero en la regionoj loĝataj de mjaŭoj havis rimarkindan disvolviĝon. Post la Liberiĝo, sub la zorgo de la Partio kaj diversnivelaĵoj populaj registaroj oni kreis skriban lingvon de mjaŭ-nacio, fondis lernejojn, eldonejojn, kinejojn, kulturajn domojn, bibliotekojn, ĉambrojn por kulturaj aktivadoj, radioricev-staciojn, librejojn kaj klubojn, kio multe antaŭenpuŝis la kulturan aferon de mjaŭ-nacio. Antaŭ la Liberiĝo en la regionoj de mjaŭoj cirkulis epidemioj, sed nun jam estas fundamente eliminataj malario, ĥolero, variolo kaj multaj aliaj malsanoj. Huangmaŭping-brigado de Ŝanhong-

komunumo de Fenghuang-gubernio en la okcidenta parto de Hunan ĉiam donis grandan atenton al la higiena laboro sub direktado de kompartiano Vu Vende, fariĝis unu el la tutlandaj avangardaj higienaj unuoj kaj gajnis honoran flagon de "modela vilaĝo de higieno" donitan de la Ŝtata Konsilantaro. Kaj Vu Vende trifoje vidis la grandan gvidanton Prezidanton Maŭ. Nun tiu ĉi brigado ne nur efektiviĝis kooperan kurac-sistemon, sed ankaŭ elkulturis tri kampul-kuracistojn, kvin akuŝistinojn kaj 20 sanitaristojn. Krome ĝi ankoraŭ aktive praktikas la principon "meti preventadon sur la ĉefan lokon", donante ĝustatempan kuracadon al malsanuloj kaj bone faras preventadon kontraŭ malsanoj.

La mjaŭ-a popolo estas grandpaŝe marŝanta sur la socialisma vojo!



EKFUNKCIIS JUNGANG-KARBOMINEJO

Lastatempe jam ekfunkciis Jungang-karbominejo de Datong-a Mina Administracio de Ŝanhi-provinco kun jara produktokvanto de 3,000,000 tunoj da karbo. Tiu karbominejo estas projektita kaj konstruita de nia lando mem.

La minejo aplikas novan teknikon, novajn ekipaĵojn, novajn materialojn kaj novan teknologion en ĉiuj procedoj, ĉu en ekspluatado aŭ karboleviĝo, ĉu en aerumo aŭ transportado.

Dum la konstruado de la minejo, sub la gvido de la partia komitato de la administracio la laboristaj amasoj faris pli ol 230 gravajn teknikajn renovigojn, tio multe rapidigis la konstruadon.

NOVA REKORDO DE KONVERTORO

La konvertoro n-ro 1 per L.D-procedo de la ŝtalejo de la Ĉefurba Ferŝtala Kompanio de Pekino kreis novan rekordon de 941 fornoj kaj per tio plialtigis la produktokvanton de ŝtalo. La produktokvanto de la ŝtalejo superis la projektitan kapablon je 70% en la pasinta jaro, kaj rimarkinde kreskis en la unua trimestro de la kuranta jaro sen pliigo de personoj kaj ekipaĵoj. La normaj ŝtalaĵoj atingis 98.87 procentojn de la produkta kvanto kaj la konsumata kvanto de ĉefaj materialoj atingis la avangardan nivelon enlandan.

Antaŭ la Granda Proletara Kultura Revolucio, la konvertoroj de la ŝtalejo nur produktis 200-300 fornoj da ŝtalo kaj foje 468. Post la proletara kultura revolucio, la produktokvanto iom post iom plialtiĝis kaj ĝi kreis en la jaro 1971 rekordon de 708 fornoj. Nun la monata produktokvanto de unu konvertoro jam egalas al tiu de tri monatoj en la jaro 1965.

Novaj Specoj de Silkaĵoj

OBSERVANTE la instrukciojn de Prezidanto Maŭ “*eivolvi novon el malnovo*” kaj “*utiligi la antikvajn en servo al la nuntempo*”, niaj projektistoj de silkaĵoj kreis lastatempe multajn specojn kun originalaj naciaj karakteroj de nia lando. Tiuj novaj specoj estas kreitaj laŭ la silkaĵoj trovitaj en la tombo n-ro 1 de Han-dinastio ĉe Mavangduj en Ĉangŝa.

En 1972, oni trovis en tiu tombo (pri kiu ni raportis en la 9-a n-ro de 1972) multajn silkaĵojn, kiuj montris eminentajn atingojn en arto kaj tekniko de nia antikva laboranta popolo. Tiuj silkaĵoj estas delikataj kaj variaj kun vivecaj desegnoj en elegantaj koloroj. La novaj specoj estas fruktoj de rekreado per nuna teknologio sur la bazo de kvintesenco de tiuj antikvaj silkaĵoj. La produktaĵoj inkluzivas natursilkajn brokatojn, atlasojn, taftojn, damaskojn, gazojn k.a. Iliaj koloroj estas harmoniaj, desegnoj delikataj kaj elegantaj, kiuj havas romantikan stilon.

La maldika natursilka “Han-tafto” sorbis la specialan karakteron de silka brodita brokato en Okcidenta Han-dinastio. Sur la oblikvaj kaj rom-baj desegnoj estas presitaj mitaj desegnoj de la silka pentraĵo trovita en la nomita tombo. La teksaĵo estas racie farita per densa kaj maldensa nodado. La desegnoj kaj fonoj reciproke kontrastas. Tiuj teknikoj akiris riĉajn artajn efikojn.


“Mavang-brokato” estas teksita per tri nave-toj alterne transjetataj. La teksaĵo sukcese reproduktis la desegnon de flugantaj drakoj sur la silka pentraĵo, kaj reprezentis la tradician karakteron de pompeco kaj lukseco de brokatoj de nia lando.

Ĉena brodado estis ĉefa metodo de brodado de la Okcidenta Han-dinastio. El la silkaĵoj de tiu periodo, multaj estis ĉene broditaj. Iliaj koloroj estas buntaj kaj desegnoj liberaj, kiuj donas stereoskopan efikon. La projekto de silkaĵo “Han-damasko” enkorpgis la artan efikon de ĉenbrodado. Ĝi prenis la variecon de silkofadenoj, tiel ke la desegnoj montris apartan efikon de perloforma brodado.

Sur la trovaĵoj el la tombo de Han-dinastio ĉe Mavangduj estas multaj desegnoj pri lukto, ĉaso, ludo de pluka kordmuzikilo *se-o*, danco k.a. Nun la projektistoj ŝanĝis kaj reorganizis la desegnojn kaj kreis diversajn “antikvajn Han-brokatojn”, sur kiuj la fadenoj helaj kaj malhelaj estas intertekstitaj en multaj tavoloj. La desegnoj montras forton kaj viklecon.

Ankaŭ “Han-brokato” el oraj kaj arĝentaj fadenoj kaj originalaj “Han-gazo” kaj “Brokato de la Okcidenta Han-dinastio” ĉiuj havas sian rimarkindan karakterizaĵon.

Han-tafto



Brokato de la Okcidenteuta Han-dinastio





La Revolucio de Tajping-a Ĉiela Regno

Gvidata de Hong Hiukjuan

LA Revolucia Movado de Tajping-a Ĉiela Regno, gvidata de Hong Hiukjuan meze de la 19-a jarcento, estas la plej grandskala kamparana revolucia milito en la historio de Ĉinio.

Hong Hiukjuan estis progresema persono de Ĉinio kiu la plej frua sin turnis al okcidentaj landoj por serĉi veron. En januaro de 1814, li naskiĝis en kamparana familio de Huahian-gubernio de Guangdong-provinco. En sia infaneco li estis jam laborema kaj legema. Li laboris kiel instruisto de privata lernejo de la vilaĝo ekde sia 16-jara aĝo kaj profunde konis la suferojn de la popolo. La malluma regado de King-dinastio, la seriozaj sekvaĵoj de la malvenko de la Opia Milito kaj preĉipe la plej fruaj invadoj de eksterlandaj potencoj al la regiono Guangdong, ĉio ĉi tio incitis la polanojn al kontraŭstaro, kaj ankaŭ la ribelemon de Hong Hiukjuan, ke li decidis fari revolucion kontraŭ King-dinastio, la lakeo de imperiistoj.

En la jaro 1843, Hong Hiukjuan kaj Feng Junŝan, lia kunlerninto, starigis "Kultan Societon al Dio" por ĵeti ĉiujn aĉulojn en la inferon. Poste li skribis artikolojn por propagandi revolucion kontraŭ feŭdismo. Li rigardis demonojn ĉiujn feojn, bodisatvojn, Konfuceon, Monfuceon kaj la imperiestrojn de King-dinastio, kaj vokis la popolon renversi ilin. Sub la nomo de misiisto Feng Junŝan propagandis la revolucion teorion al malriĉaj kamparanoj kaj ligno-karbistoj en Zigingŝan-regiono de Guanghi, por disvolvi la revolucion forton. Kaj dum la batalo kontraŭ bienulaj trupoj, iom post iom formiĝis gvida kerno kun Hong Hiukjuan kiel estro kaj Feng Junŝan, Jang Hiuking kaj Hiaŭ Ĉaŭgaj kiel vicestroj.

En la somero de 1850, Hong Hiukjuan ordonis, ke la membroj de la "Kulta Societo al Dio" kolektiĝu en la vilaĝo Gintian de Gujping-gubernio de Guanghi. En la 11-a de januaro, 1851, Hong Hiukjuan kaj liaj kunbatalantoj direktis la mem-

brojn al ribelo en Gintian-vilaĝo kaj deklaris starigon de la Tajping-a Ĉiela Regno kun Hong Hiukjuan kiel ĝia Tian Vang (Ĉiela Reĝo). Terurita de la kamparana insurekcio, la registaro de King-dinastio tuj sendis grandan nombron da armeanoj por fari ĉirkaŭekstermon al ili. Post malfacila luktado la Tajping-a armeo trarompis la ĉirkaŭ-

Soldato de la Tajping-a armeo (argila skulptaĵo)





Hong Hiukjuan (argila busto)


ekstermon kaj marŝis norden de Guanghi. Ili severe subpremis reakciajn ŝtatajn oficistojn kaj bienulojn kaj bruligis kamp-atestojn kaj ŝuldatestojn ĉie, kien ili venis, kaj ricevis varman akcepton kaj subtenon de la popolo. Multaj amasoj aliĝis al la insurekcia armeo, kaj ĝi havis jam 500,000 personojn en januaro de 1853, kiam ĝi konkeris la urbon Vuhan. En februaro de la sama jaro Tajping-a armeo marŝis de Vuhan orienten laŭlonge de Jangzi-rivero al Nankino. Anstataŭ rezisto, la King-dinastiaj armeanoj forfuĝis panike forlasante urbojn kaj kirasojn. Post iom pli ol unu monato la insurekcia armeo jam atingis Nankinon. En la 19-a de marto ĝi disrompis urbopordegon per mino, mortigis la gubernatoron kaj 20,000 armeanojn de King-dinastio, kaj fine okupis Nankinon. Ili alinomis ĝin Tianging (Ĉiela Ĉefurbo), kiel ĉefurbon de la Tajping-a Ĉiela Regno.

Poste la Ĉiela Regno publikigis la “Agraran Sistemon de la Ĉiela Dinastio”, deklarante, ke ĉiuj agroj apartenas al ĉiuj homoj de la lando kaj pledante por aboli la feŭdan agroposedan sistemon kaj distribui la agrojn al kamparanoj, por efektiviĝi racian socion kie agroj, manĝoj, vestoj kaj mono apartenas al ĉiuj kaj troviĝas nenia malega-

leco kaj neniu malsatulo. Ili ankaŭ oponis kontraŭ aĉeto de edzino por la egaleco inter la viroj kaj virinoj.

En majo de 1853 Hong Hiukjuan sendis du trupojn por fari nordan kaj okcidentan ekspediciojn. La norden marŝanta trupo sub la gvido de Lin Fenghiang bataladis en la provincoj Anhuj, Henan, Ŝanhi kaj Hebej, kaj rekte minacis la neston de la regantoj de King-dinastio. La okcidenten marŝanta trupo kun Laj Hanjing kiel estro marŝis laŭ Jangzi-rivero kaj konkeris multajn lokojn de la provincoj Anhuj, Gianghi kaj Hubej. La atako estis tiel forta, ke Zeng Guofan, estro de la Hunan-provinca armeo, volis plurfoje sin dronigi. En la jaro 1856, la Tajping-a armeo ekstermis du grandajn tendarojn de la King-dinastia armeo respektive en nordo kaj sudo de Jangzi-rivero, kaj eliminis ĝian minacon al Tianging. Tiam la Tajping-a Ĉiela Regno atingis sian kulminon en milito.

La prospera disvolviĝo de la revolucia movado terure konsternis imperiistojn kaj feŭdajn bienulojn. En komploto ili intencis subfosi la revolucion movadon interne kaj ekstere. En septembro de 1856, utiligante la ŝancon ke Dong Vang (Orienta Reĝo) Jang Hiuking devigis Hong Hiukjuan honori lin per la titolo Vansuj, per kiu oni kutime nomis regnestron, Vej Ĉanghuj, bienulo enŝteliĝinta en la gvidantaron de la Tajping-a Ĉiela Regno mortigis Jang Hiuking kaj liajn familianojn, kaj pli ol 20,000 oficirojn kaj soldatojn. Tio metis la politikan pozicion de Tianging en krizon. Subtenate de vastaj amasoj kaj armeanoj de Tianging Hong Hiukjuan subpremis la intrigan ribelon de Vej Ĉanghuj kaj portempe stabiligis la pozicion. Tamen en la sekvanta jaro, pretekstante ke Hong Hiukjuan suspektas lin, Ji Vang (Ala Reĝo) Ŝi Dakaj faris splitiĝon kaj trompe forkondukis centkelkdek mil plej elitajn armeanojn. Post plurfojaj bataloj kontraŭ King-dinastia armeo li kapitulacis kun restantaj kelkmil armeanoj sub sia gvido al King-dinastio. Samtempe imperiistoj pli fortigis sian premadon al la registaro de King-dinastio por akiri pli da privilegio kaj post kiam la King-dinastia registaro subskribis en 1860 la malhonoran kaj humiligan Pekinan Traktaton, ili anstataŭigis sian neŭtralecon per atako kontraŭ la Tajping-a Ĉiela Regno. Por protekti la nacian dignon kaj oponi kontraŭ ekstera invado Hong Hiukjuan severe rifuzis la malracian postulon de eksterlandaj ministroj pri konfirmo de neegaleca traktato, malpermesis importon de opio kaj disrompis plurajn armitajn atakojn de la eksterlandaj agresantoj.



Sed sub la kuna atakado de la en- kaj eksterlandaj malamikoj malvenkis la revolucia movado de la Tajping-a Ĉiela Regno en la jaro 1840. La kaŭzo en tio estis, ke al ĝi mankis en la tiamaj historiaj kondiĉoj gvido de progresinta proletara partio, ĝisfunda revolucia programo, profunda kono pri la naturo de imperiismo kaj alta singardemo

kontraŭ klasaj malamikoj enŝteliĝintaj en la insurrekcia armeon.

La revolucia movado daŭris 14 jarojn kaj disvastiĝis ĝis 18 provincoj. Ĝi forte batis imperiistojn kaj ilian lakeon — la ĉinan feŭdan forton — kaj ekbruligis la revolucian fajron de la ĉina popolo kontraŭ imperiismo kaj feŭdismo.



Kurantaj Aferoj



ALIA 125,000-KILOVATA GENERATORA KOMPLETO

Unu 125,000-kilovata generatora kompleto kun interne farita duobla akva malvarmigo estis sukcese instalita de Lajvu-elektrejo de Ŝandong-provinco, kaj oficiale funkciis en la fino de la pasinta jaro. Dum la lastaj monatoj, bone funkcias la generatora kompleto kaj la provizata elektro multe subtenas la industrian kaj agrikulturan produktadon de tiu provinco.

La konstruado de la ĉefa domo de la elektrejo kaj la instalado de la generatora kompleto uzis nur iom pli ol unu jaron.

SURAKVIĜIS 3,000-TONELA FERBETONA VARŜIPO

Lastatempe sukcese surakviĝis 3,000-tonela ferbetona marborda varŝipo "Gutian".

La varŝipo longas 105.2 metrojn kaj ĝia naviga rapideco atingis 13.5 marmejlojn po horo. La ŝipkorpo konstruiĝis el ŝtaldrata reto kaj betono, bozonante malmulte da ŝtalaj materialoj, ĝi estas fortika, kontraŭkoroda, facile riparebla kaj vaste uzebla. Laŭ statistiko, la ŝtalo bezonata de tiu ŝipo estas malpli multa je 44 procentoj kompare kun tiu de la samtonela ŝtala ŝipkorpo kaj la konstrua kosto estas pli malkara ol tiu de la samtipa ŝtala aŭ ligna ŝipo.

Sur la Kovrilo:

Signalisto de trajno

Sur la Dorskovrilo:

Angulo de la Nankina Petrol-
kemia Fabriko




EL POPOLA ĈINIO 人民中國報

Monata gazeto eldonata de ĈINA ESPERANTO--LIGO
P.O. Kesto 77, Pekino, Ĉinio

N-ro 7 (180) 1973

Ĉefa Enhavo

Pekino Ĝoje Celebris la Unuan de Majo.....	1
Batala Vojo.....	7
Partifilia Sekretario Vang Giang.....	13
Du Sitejoj da Akvo.....	18
Kvazaŭ Preciza Horloĝo.....	24
Jihikjuĝen pri Si Mem.....	25
Pri la Minada Instituto de Siĉuan.....	27
Bonaj Pilkoj Zorge Faritaj per Lertaj Manoj.....	31
Al Matena Sun' Similas Amikeco Nia.....	34
Kultura kaj Amikeca Aktivado.....	38
Nova Fizionomio de la Monda Tablotenisa Sporto.....	41
Mjaŭ-nacio	45
Novaj Specoj de Silkaĵoj.....	48
La Revolucio de Tajping-a Ĉiela Regno Gvidata de Hong Hiukjuan	49



Orhara Simio

Orhara Simio (*Rhinopithecus roxellanae*), unu el la raraj bestoj, vivas en montregionoj de niaj sudokcidenta kaj nordokcidenta partoj. Ĉisube ni prezentas orharan simion de Siĉuan-provinco (*R.r. roxellanae*), kiu vivas en okcidenta Siĉuan kaj sudaj Gansu kaj Ŝenhi. La simio, kun facio de aparta formo kaj ŝvela kaj elstara buŝo, havas orflavajn, nigre brunajn kaj laktoflavajn harojn. Ĝi alinomiĝas Simio kun Suprenlevita Nazo pro siaj naztruoj supren levitaj.

Tiaj simioj vivas en monta arbaro ĉ. 3,000 metrojn alta super la mara nivelo kaj manĝas ĉefe foliojn kaj branĉojn de arboj kaj sovaĝajn fruktojn. La simioj estas singardemaj kaj lertaj en saltado kaj grimrado sur arboj. En vintro, por serĉi manĝaĵon kaj eviti froston, ili ofte transloĝiĝas en arbaron kun larĝaj folioj ĉ. 1,500 metrojn altan super la mara nivelo.

Post la komenco de la kuranta jarcento, kiam aperis priskribo pri ili, ĝia specimeno estas malfacile akirebla. De la jaro 1967, tiaj bestoj estas sinsekve kaptitaj. Ili estas obeemaj kaj netimemaj, kaj povas adaptiĝi al la dresado.

